

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



*Afiŝo de la 3a Internacia Fotoekspozicio
en Budapeŝt*

N-ro 627 (2)
Februaro 1958

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro:
MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornside Road, Johnstone,
Renfrewshire, Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C.,
Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la
redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la
1-a de la antaŭa monato

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke
oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj. Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario 77, Grasmere Avenue
Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale
Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.
Telefono: ARNold 90-81.

Enhavo

27.093	17
Angla Antologio	17
Omaĝe al la memoro de D-ro Kamaryt	19
Germanaj katedraloj	26
El la redakcio	30
Ni funebras	34

Rubrikoj

Nia forumo	18
La internaciaj konkursoj	25
La Juna Vivo	27
43-a Universala Kongreso	28
Ŝaka Rubriko	29
CED	30
Magnetofona Servo	31
Koresponda Servo Mondskala	31
Radio	32
Esperantista Vivo & Nekrologo	33
Oficiala informilo	34

Manuskriptoj por „Esperanto“ devas esti klare taj-
pitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco,
en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Ne-
uzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ
afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

La tago iĝas jam vespero. Jus oni portis la poŝtaĵojn, la lastajn de 1957. Ili enhavis ankoraŭ kelkajn tre malfruiĝintajn kotizojn de la kuranta jaro. Mi registras ilin kaj fermas la membrostatistikon 1957. Ĝi finiĝas per la cifero 27093. Cifero, neniam pli frue atingita.

Post kelkaj horoj komenciĝos la jubilea jaro de U.E.A., la 50-a de ĝia ekzistado. Ĝi trovos Asocion, pli fortan ol iam ajn, Asocion troviĝantan en grandioza svingo antaŭen, kies kulmino ankoraŭ ne estas videbla. Fine de 1953: 16.861 membroj; fine de 1954: 16.826 membroj. Stato kvazaŭ stagna. Fine de 1955: jen 20.788 membroj. Komenciĝis la svingo. Fine de 1956: 23.130; fine de 1957: 27.093 membroj! Saltego de pli ol 10.000 membroj en tri jaroj. Forta armeo de pacaj, sed persistaj batalantoj almarŝas por atesti pri la plej forta interpopola ligilo iam kreita.

Des pli elokvente parolas tiuj ĉi ciferoj, se oni konsideras, ke ankoraŭ daŭre granda parto de la mondo, en kiu troviĝas multegaj fervoraj esperantistoj, estas preskaŭ fermita por la Asocio pro valutaj malhelpaĵoj.

Eĉ pli elokvente ankoraŭ ili parolas, se oni prenas en konsideron la klopodojn flanke de iu jam elmodiĝanta politika gento, senkreditigi la neŭtralecon de la Asocio.

Pli ol interesa en kunligo kun tio estas la ĉijara rezulto de la Internacia Konkurso I, troviĝanta sur alia paĝo de tiu ĉi numero de la revuo. Usono venkis kun 159,97 %, kio estas 16 % pli ol la lando kiu tuj sekvas ĝin. Tio atestas pri la freŝa elano, kiu karakterizas la movadon ankaŭ en Usono nun — post liberiĝo de ĝiaj bremsoj — sub gvidado de la tiea landa Asocio ELNA. La prestiĝo de tiu Asocio montriĝis en ĝia brila lastjara kongreso en Novjorko, kiun oficiale akceptis en la nomo de Unuiĝintaj Nacioj la Direktoro pri Publika Informado de UNO en la oficiala akceptejo de la UNO-sidejo.

Ke ne nur kvante kreskas U.E.A., sed ke krome ĝia morala pozicio en eksteresperantistaj medioj estas pli forta ol iam antaŭe, tion pruvas i.a. la faktoj, ke unuan fojon UNESKO oficiale uzis Esperanton por eldono de serio de belegaj afiŝoj pri siaj laboroj, dum dank' al agado de UEA kaj ELNA, la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj eldonis sian afiŝon pri la Tago de U.N. ankaŭ en Esperanto.

Estas klare, ke ĉiam pli grandaj nombroj da esperantistoj sentas sin allogataj de la aktivecoj de U.E.A. Sed ĉiam pli grandan subtenon ni ja bezonas por atingi nian celon: la Internacia Lingvo por ĉiuj internaciaj rilatoj. Komune antaŭen, pli forta ol iam ajn, ek al preparoj por brila Zamenhofa Jaro!

M. H. VERMAAS

La vivsango de nia Asocio estas la kotizoj

Vi certe volas frue pagi la vian

Antaŭen al 30.000!

Estas la 15-a decembro. La tago, en kiu ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiu unuopa praktikanto de la Internacia Lingvo respektive rememoras pri D-ro L. L. Zamenhof. Sed ankaŭ la tago, dediĉita al la Esperanto libro: tiu libro, kiu plenigas la lingvon per kultura enhavo, evoluigas ĝin interne, firmigas ĝian unuecan uzadon kaj tiel ankaŭ helpas al ĝia plua disvastigo.

La ĉi-jara 15-a de decembro estas markita per eksterordinare grava evento. Hieraŭ matene atingis min la luksa eldono de Angla Antologio (1000—1800). Nun tiu impona volumo kuŝas sur mia skribotablo. Malgraŭ la amasego da urĝaj laboroj, mi ne povis rezisti la sopiron malfermi ĝin. Kaj ŝarinte tion, ne plu estis eble ne tralegi la brilan enkondukan studon pri la angla literaturo de Marjorie Boulton, trafoliumi la verkon, halti tie ĉi kaj tie almenaŭ por momento super iu poemo aŭ proza parto.

Ne estas mi, kiu ŝaros la recenzon. D-ro Kalocsay, nia plej kompetenta literaturisto, ricevis tiun taskon. Mi nur volas publike esprimi miajn sentojn de raviteco kaj fiero. Raviteco pro la fakto ke la Esperantismo posedas tiel klerajn kaj elstarajn literaturajn tradukantojn; fiero tial, ĉar post longjara paŭzo denove aperas gravega antologio de nacia literaturo en la Internacia Lingvo. Fiera ankaŭ tial, ĉar estas precize U.E.A., kiu decidiĝis preni la jam kelkajn jarojn pretan manuskripton el la tirkestoj kaj publikigi tiel gravan kulturen verkon en formo digna de ĝia enhavo.

Al William Auld kaj Reto Rossetti, kiuj redaktis la volumon kaj mem multe kontribuis, direktiĝas la plej varmaj gratuloj. Korajn gratulojn ankaŭ al aliaj tradukintoj: F. R. Banham, C. D. A. Capp, John S. Dinwoodie, A. D. Foote, John Francis, G. C. Jervis, E. P. Ockey, Alec Venture kaj G. Waringhien.

Dankesprimojn meritas la Di-

rektorino de la C.O. de U.E.A.,
ĵ-ino M. Vermaas, pro la pri-
zorgo de la eldono, tiel impone
bela, publikigita precize la antaŭ-
viditan tagon.

Dum multaj jaroj ni vane klo-
podis establi en U.E.A. eldonan
ĵakon, kiu riĉigos la Esperantan
literaturon per vere valoraj verkoj.
Nun tiu projekto, kiu ankoraŭ
antaŭ nelonge ŝajnis nerealebla
revo, fine efektiviĝis. Angla An-
tologio estas la unua granda paŝo.
Kiam ni ekiras iun vojon, ni ne
kutimas halti! I. L.

NIA FORUMO

VAPORSIPO kaj VAPORBOATO

Estimata Redaktoro,

La letero de s-ano Wagner en via
novembra numero serĉas distingajn ter-
minojn por akvoveturiloj maraj, laĝaj kaj
riveraj. Multaj lingvoj ŝajne ne bezonas
tiajn specialajn terminojn. Kiam diferenco
estas indikenda, oni povas uzi adjektivojn:
mara, laga, rivera, kanala, havena.

Sed la situacio rilate la nomojn de
diversaj specoj de navigeblaj flusiloj estas
iom nebula. Ekzistas du aŭtoritataj vort-
fontoj: (1) Plena Vortaro; (2) Marista
Terminaro de Komandanto Peter Clis-
sold. La lasta aperis en la duaj partoj de
la UEA Jarlibroj 1949 kaj 1950, kaj
meritas la atenton de ĉiuj vortaristoj.
Bedaŭrinde la difinoj en la du verkoj
ne ĉiam reciproke kongruas. Jen kelkaj
ekzemploj:

Barko. PV: Ĉiuspeca senferdeka ŝipeto.
MT: Tia, kia estas kutime pelata per
veloj, ĉu kun ĉu sen motoro.

Boato. PV: Barko kun kvadratforma
postajo. MT: Tia, kia estas sufiĉe mal-
granda esti pelata per remiloj, aŭ kun
aŭ sen motoro, veloj.

Sipo. PV: Ĉiaspeca veturilo por veturi
sur akvo. MT: Tia, kia estas nuntempe
pelata per maŝino, aŭ vapora aŭ disela
motoro... sed ankaŭ velŝipoj, la plej
granda speco de barkoj.

Salupo. PV: Granda boato, boatego.
MT: Malgranda ŝipo aŭ barko por ĝene-
rala laboro en havenoj aŭ riveroj.

S-ano Clissold listigas multe da aliaj,
i.a. pramo, kutro, kanoto, gondolo, jakto
(PV jahto), korveto, barĝo, gabaro,
pinaso, gigo, skuno, koraklo, kajako, ktp.

Sed s-ano Wagner notu: la difinoj de
nek PV nek MT pravigas la vorton
„vaporboato”. Efektive ĝi estas anglismo.
Ĝia origino kuŝas en la tradicia angla
gusto pri humura litoto; la anglo nomas
ŝipon *boat*, kiel li nomas aeroplanon *kite*
(flugdrako), korpulentulon *tiny* (nano),
ĉerkon *wooden overcoat* (ligna surtuto),
la Atlantan Oceanon *the pond* (la
laĝeto), kaj la gravuritajn vazojn el oro,

arĝento, ktp., per kiuj oni premias atlet-
ojn, pots (potoj).

La fruaj usonanoj plagiatas tiun ŝercan
parolmanieron, kaj evoluigis ĝin en am-
pleksan slangon jargonon kiu, pere de
kino, vaste penetris la mondon, sub-
fosante la purecon de klasika anglaĵo.
Providenco gardu nian Esperanton kon-
traŭ tia idiotisma pleto! (Usonaj sami-
deanoj, pafu!)

Avoto

En „Esperanto”, nov. 1957, p. 170 s-ro
G. E. Wagner proponas, ke oni nomu
navigilon, kiu veturas sur riveroj kaj
lagoj, „vaporboato”, „ĉar estas same
stulte nomi vaporboaton vaporŝipo kiel
nomi bovon ĉevalo, nur ĉar ambaŭ tiras
ŝarĝojn”. Sed li mem faras la saman
eraron: estas tamen konsiderinda diferen-
co inter rem-vel- kaj motor-boatoj kaj
rivera-laga navigilo, kaj kiu scias, kiam
la lastenomitaj komencos ĝenerale uzi
motoron anstataŭ la vapormaŝino. Ek-
zistas tamen pli bona solvo: nomu la
riveran navigilon vapor- (aŭ motor-)-
barko. Certe PV diras, ke „barko” estas
senferdeka ŝipeto, sed certe tiu difino
estas nur surogato pro manko de pli
bona difino; origine barko signifis 3-5
mastan velŝipon; kaj ni plene rajtas imiti
la hispanan „barko de vapor”, por tiel
atingi ankoraŭ pli kontentigan diferen-
con de la nuntempaj civilaj navigiloj.

Vilho Setälä, E. Akad.

„La tera sano”

Estimata S-ro Mag. W. Auld
Redaktoro de „Esperanto”,

Mi legis en la revuo „Esperanto” de
oktobro ĉi-jare la artikolon de Lordino
Eve Balfour „La tera sano”, kaj petas
ke vi permesu al mi fari kelkajn observ-
ojn rilate al tiaj malsanoj kaj ...pestoj(?)
de la tero, traktitaj de la aŭtorino.

Mi opinias ke al ĉiuj fakaj scienculoj
kaj teknikistoj estas konate, ke la livero
al la tero de organikaj sterkajoj pliboni-
gas la fizikajn, kemiajn kaj biologiajn
kondiĉojn de la tero mem, dum la daŭra
enterigo de kemiaj sterkajoj povas estigi
la tiel nomitajn mankomalsanojn de la
plantoj, kiel ŝajnas esti la malsano de
tiuj plantoj montritaj en la bildo de la
revuo. Spite tion la kultivistoj estas ofte
devigataj uzi kemiajn sterkajojn anstataŭ
la naturajn, pro la simpla kialo, ke la
naturajn ili tute ne posedas, aŭ posedas
dlin en nesufiĉa kvanto por atingi la
nuntempajn produktaĵojn.

La aŭtorino parolas poste pri la
aktualaj multnombraj kontraŭparazitaj
ŝprucadoj, kiuj estas danĝeraj al la bio-
logia ekvilibro. Sed tio estas alia afero,
ĉar la ŝprucado de iuj modernaj insekt-
icidoj povas difekti la biologian ekvili-
bron de la planto, ne tiun de la tero.
La kontraŭparazitaj ŝprucadoj tute ne
influas al la sanstato de la tero.

Rilate al la nuntempa kontraŭparazita
lukto, la scienculoj avertis jam multfoje
la terkulturistojn pri la danĝero, kiun
oni povas renkonti, sekve de la detruo
de multaj utilaj insektoj; tamen la kul-
tivistoj preferas ofte mortigi ĉiujn, ĉu

malutilajn, ĉu utilajn insektojn, ol perdi
sian rikolton.

La terkulturistoj kiuj konfidas al la
naturaj metodoj ne sukcesas rikolti fruk-
tojn. Mi povas diri tion, ĉar mi mem
vivas en agrikultura medio kaj, se vi
tion deziras, povas sendi al vi foto-
grafajojn montrantajn la aferon laŭ tute
kontraŭa maniero ol la bildoj publikitaj.
Eĉ kontraŭ tiaj parazitaj, kiuj, kiel ek-
zemple la lanluso de la pomo kaj la
ŝildluso de la morusarbo, povas esti
luktataj per biologiaj metodoj, la kultiv-
vistoj preferas kutime uzi la drastajn
insekticidojn, eĉ se tiel farante ili mort-
igas ankaŭ amason da biologiaj mal-
amikoj de la parazitaj.

Kiel vi vidas ne estas ekzakte paroli
pri malakordo inter teorio kaj praktiko
sur tiu kampo, kaj ankaŭ oni povas
kulpiĝi nek la scienculojn, nek la kultiv-
istojn pri la nuna kondiĉo de la plantoj.
La kaŭzo de tio estas verŝajne la grand-
skala intensigo de la kultivaĵoj dum la
lastaj tempoj.

Bonvolu, sinjoro redaktoro, akcepti
miajn respektplenajn kaj samideanajn
salutojn. G. Perini

Faldprospektoj

Feliĉe Esperanto jam de antaŭ longe
estas utiligata ankaŭ en la turismo, kaj
ĉiujare aperas pluraj faldprospektoj kun
Esperanto-teksto. Estas memkompre-
neble, ke la esperantistoj vaste subtenu ĉi
tion, por ke la propaganda valoro ne
fariĝu negativa. Sed ĝuste la propagan-
da valoro dependas ankaŭ de aliaj afe-
roj. Ĉu vi bonvolus en via gazeto pre-
cipe akcenti, ke ĉiuj kiuj eldonas turist-
broŝurojn esperantlingve klare kaj unu-
paĝe devus skribi la vorton ESPERAN-
TO. Multaj nespertaj funkcianoj en tu-
rismaj oficejoj kredas ke la presajoj en
Esperanto estas portugalaj.

Ole Nederland

Oratora konkurso 1958

En la kadro de la 43a Universala
Kongreso en Majenco okazos Oratora
Konkurso. Rajtas partopreni tiun kon-
kurson ĉiuj gejunuloj ĝis 28-jaraj, kiuj
aliĝis al la 43a U.K. kaj partoprenas ĝin.
La partopreno en la konkurso estas sen-
paga, sed ĉiu partoprenonto devas sin
skribe anonci al la prezidanto de la
Komisiono minimume unu tagon antaŭ la
tago de la konkurso. Estas tamen dezir-
inde, ke la partoprenontoj anoncu sin kiel
eble plej frue al la L.K.K.

La Oratora Konkurso okazas kom-
preneble en Esperanto. La kandidatoj
devas paroli libere, sen anticipe skribita
teksto, sed ili povas uzi memorigajn
notetojn.

La temo por 1958 estas „La rilatoj
inter juna kaj pli aĝa generacioj”. La
gajnintoj ricevos premiojn. Ni kore in-
vitas niajn junajn samideanojn jam nun
sin anonci kiel partoprenontoj al la Kon-
stanta Kongresa Sekretario, 43a Univer-
sala Kongreso de Esperanto, Mainz,
Germanujo.

OMAGE AL LA MEMORO DE D-ro STANISLAV KAMARYT

*Por forviŝi kotmakulon, jetitan sur la
brilan nomon de D-ro Stanislav Kama-
ryt, mi skribas tiujn ĉi liniojn. *)*

Dum pluraj jaroj mi ĉiufoje denove ĝojis, kiam inter la poŝtaĵoj mi trovis leteron aŭ karton kun la poŝtstampo *Podebrady* aŭ *Chotebor*. Ĝi povis esti nur de unu persono, nobla, klera, kaj ĉiam junece kuraĝa: D-ro Kamaryt. Kaj kiam iun aŭgustan tagon 1956 denove, post iom longa paŭzo, alvenis korespondaĵo kun la konata stampo, sed ĉi-foje ankaŭ kun nigra rando, mi sciis antaŭ ol malfermi ĝin, ke ĝi alportas informon tristan. La mortanonco estis en la ĉeĥa, sed en la dekstra supra angulo estis presite en Esperanto:

*„En la mondon venis nova sento . . .
Ĝi promesas sanktan harmonion”*

Nenio pli trafa povis esti elektita por simboli la vivon kaj strebadon de tiu elstara homo, ol la du versoj el la himno de fido kaj espero.

Kelkaj biografiaj notetoj

Stanislav Kamaryt, doktoro pri filozofio kaj direktoro de gimnazio en pensio, forpasis la 30-an de julio 1956. Li naskiĝis la 10-an de novembro 1883. Ek de la jaro 1900, kiam li eklernis Esperanton, ĝis sia morto li estis ne nur fidela adepto de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ tre aktiva laboranto por ĝia progresigo sur diversaj kampoj. En la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado li okupis altajn poziciojn, estis redaktoro aŭ kunredaktoro de Esperanto-gazetoj, verkis multajn studojn kaj artikolojn. Sur la literatura kampo li famiĝis kiel kunredaktoro de la bonega Ĉeĥoslovaka Antologio kaj kiel kunlaboranto de Literatura Mondo. Lia plej grava verko estas sendube la Filozofia Vortaro.

D-ro Kamaryt estis membro de la iama Lingva Komitato kaj poste, ĝis sia morto, de la Akademio de Esperanto.

La 5-an de marto 1952, nurajn du monatojn post la fondiĝo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado, li fariĝis ĝia kunlaboranto kaj en akompana letero li salutis kun entuziasmo la funkciigon de tiu institucio. Al CED li faris multajn servojn ne nur per siaj konsiloj, sed ankaŭ per plej aktiva helpado, precipe dum la periodo de Montevideo. Li mem, kvankam jam tre aĝa, iniciatis kaj zorgis en sia lando la kolektadon de libroj kaj aliaj materialoj por la granda Universala Ekspozicio de Esperanto en tiu urbo kaj verkis tre bonan raporton pri la Esperanto-Movado en la Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Eksciinte pri la forpaso de D-ro S. Kamaryt, mi direktis al la familio en la nomo de CED, de

UEA kaj en mia propra kondolencan leteron, en kiu mi skribis interalie:

„Mi neniam havis la honoron persone konatiĝi kun li, sed el liaj verkoj kaj korespondaĵoj mi ekkonis grandan homon, kiu dediĉis sian vivon al la Internacia Lingvo kaj al tiuj noblaj idealoj, kiuj estas esence ligitaj al ĝi. Lia nomo restos por ĉiam enskribita en la kultura historio kaj la memoro al lia personeco daŭre vivos en la koroj de ĉiuj, kiuj kredas je homeco kaj fidas je la estonteco de la homaro.”

La falsajo

Estas tute nature, ke en la Esperanto-gazetaro aperis pli aŭ malpli longaj nekrologoj pri D-ro Kamaryt. Sed mi ne trovas vorton por esprimi mian naŭzan ŝokon, kiam nur antaŭ kelkaj tagoj mi legis artikolon, en kiu eĉ la nomo de tiu nobla filozofo estis misuzita en fia, longjara kampanjo de mensogoj kaj kalumnioj.

D-ro William Solzbacher, kunredaktoro de Amerika Esperantisto publikigis en tiu gazeto de G. A. Connor, eksigita el UEA pro gravegaj agoj kontraŭ la Asocio kaj la Esperanto-Movado ĝenerale, artikolon sub la titolo „Memore al D-ro Stanislav Kamaryt” (Jan.-Feb. 1957). En ĝi li prezentis kaj emfazis la meritojn de la mortinto por la Esperanto-Movado. Pri tio ĉiu konsentas. Li karakterizis la personecon de D-ro Kamaryt per jenaj vortoj:

„Li estis Esperanto-pioniro laboranta kun sistemo kaj persisto, akra observanto, serioza amiko de scienco, literaturo kaj kulturo, vera demokrato, nobla homo. Ne ignorante la necesecon esti singarda, li estis tre kuraĝa, kiam li opiniis, ke la risiko valoras la penon.”

Ĉiuj, kiuj iel kontaktis kun D-ro Kamaryt, sendube konsentas ankaŭ pri tiuj vortoj. Se nur tio estus skribita, ne estus necese fari ian ajn rimarkon. Sed en tiu okazo D-ro Solzbacher tre verŝajne eĉ ne skribus la artikolon, ĉar, kiel tuj vidiĝos, ĝia vera celo ne estis omaĝi al D-ro Kamaryt. Tute male, tiu malfeliĉa evento, antaŭ kiu eĉ la plej obstinaj malamikoj klinas respekte sian kapon, estis ekspluatita por plia maldigna intrigo. Pri kio temas?

D-ro Kamaryt, kiu korespondis kun multaj personoj tra la mondo, estis en skribaj rilatoj ankaŭ kun D-ro Solzbacher laŭ lia propra aserto en la menciita artikolo. El tiuj multaj leteroj D-ro Solzbacher elektis por „citi” precize tiun de la 9-a de aprilo 1952, ĉar ĝuste tiu letero ebligis misuzi eraran opiniesprimon de D-ro Kamaryt, kaŭzitan de ignorado de grava fakto. Tiu letero de D-ro

Kamaryt konsistas el tri alineoj. En la unua alineo li skribis:

„Mi legis vian artikolon anglalingvan en Oktobra numero de Amerika Esperantisto kun sincera intereso kaj gratulas vin pro eminenta kono de la situacioj. Vi certe jam rimarkis, ke nia revuo nek E-servo nek Esperantisto Slovaka ne aperas plu de post la 31-a decembro 1951. Mi tion bedaŭras tre, ĉar ĝi signifos finon de organizita movado en nia lando, eĉ se nia Asocio ankoraŭ ekzistas.”

En la dua alineo D-ro Kamaryt skribis:

„Mi tre bedaŭras, ke ‚Problemoj‘ ne aperas. La kritiko de Heroldo kaj de UEA estis naiva. La verkintoj ne spertis, kion signifas Hitlerana premo, eĉ se Jung havis en sia oficejo Hitler-portreton. Vi spertis kaj mi spertis, tial mi tiom bone komprenas vian sintenon. Laŭ mia opinio sukceso de Hitler rezultis ankaŭ el tio, ke la demokrataj fortoj ekster Germanujo neniel helpis nek provis helpi al la demokratoj germanaj. Oni povas diri, ke la germanaj demokratoj ne petis pri helpo. Sed nun mi vidas, ke ili havis nenian eblecon eĉ por peti tian helpon. La sola ebleco estis forkuri. Sed fuĝi povis malmultaj, kaj la fuĝintoj neniel povis helpi al la restintoj. La ‚Problemoj‘ povis laŭ mia opinio iniciati diskuton kaj disputon pri neŭtraleco. Ĝi estus tre utila, laŭ mia opinio oni ne rajtas esti neŭtrala al malbono kaj al krimo. Almenaŭ se oni povas iel agi.”

La trian alineon provizore ni ellasu.

Kion do faris D-ro Solzbacher el tiu letero?

Unue, laŭ la jam famiĝinta metodo de la redaktoroj Connor-Solzbacher de Amerika Esperantisto citi duonon de frazo, ellasi gravajn vortojn, kunligi (per punktetoj . . . por savi la purecon de sia konscienco!) en unu tuto frazerojn el diversaj alineoj, eĉ el malsamaj verkoj kaj tiamaniere falsi la enhavon, D-ro Solzbacher prenas parteton *el la unua alineo* de tiu letero kaj parteton *el la dua*, bele ligas ilin per punktetoj en unu tuto, enmetas neeldiritajn vortojn kaj tiel plene deformas la penson de la mortinto — kiu bedaŭrinde ne plu povas protesti — kaj miskondukas la leganton. D-ro Solzbacher „citas” la leteron de D-ro Kamaryt jene:

„Mi legis vian artikolon (pri ‚Esperanto kaj la Fera Kurteno’) . . . en Amerika Esperantisto kun sincera intereso kaj gratulas vin pro eminenta kono de la situacioj . . . La kritiko de Heroldo kaj UEA estis naiva. La verkintoj ne spertis, kion signifas Hitlerana premo, eĉ se Jung havis en sia oficejo Hitler-portreton. Vi spertis kaj mi spertis, tial mi tiom bone komprenas vian sintenon . . . Laŭ mia opinio oni ne rajtas esti neŭtrala al malbono kaj al krimo. Almenaŭ se oni povas iel agi.” (p. 20)

Tiu „citaĵo” estis skribita komence de la artikolo. Fine de la artikolo, sur la p. 23, sub la fotokopio de la letero, ĝi ricevis jenan formon (mi denove citas D-ron Solzbacher):

„La leteroj de D-ro Kamaryt skribitaj sub la komunista diktatoreco estis klaraj kaj kuraĝaj: ‚mi gratulas vin pro eminenta kono de la situacioj . . . La kritiko de Heroldo kaj UEA estis naiva . . . Oni ne rajtas esti neŭtrala al malbono kaj al krimo.’”

Fakte, la du alineoj rilatis al *du tute malsamaj aferoj*: la unua al la tiama tre bedaŭrinda situacio de la Esperanto-Movado en la Ĉeĥoslovaka Respubliko; *la dua al hitlerismo*. Sed D-ro Solzbacher, kiel ĉiu facile konstato komparante la originalon kun la „citaĵo”, prenis el ĉiu el la du alineoj po kelkaj vortoj, aldonis vortojn netroviĝantajn en la originala letero, ĉion ĉi ligis per la konsciencosavaj punktetoj, bone miksis aldoninte pliajn proprajn spicaĵojn kaj servis tion al neatentema leganto kiel aŭtentikan citaĵon de la mortinto!!

La falsajo, tamen, ne finiĝas tie. D-ro Solzbacher misuzis la neinformitecon (aŭ misinformitecon) de la mortinto rilate la enhavon kaj karakteron de „Problemoj” kaj rilate la fantazian rakonton pri la kvazaŭa Hitler-emo de s-ro Teo Jung por plene miskonduki la legantojn al sia vera celo: kredigi al ili, ke persono kun tiel altaj moralaj kaj intelektaj kvalitoj, kiel D-ro Kamaryt, aprobis la skribadon de tiu fipamfleto nomata „Problemoj” kaj mem asertis, ke s-ro Teo Jung havis portreton de Hitler en sia oficejo. En la artikolo D-ro Solzbacher ne nur ne atentigis la leganton koncerne tiujn du gravegajn erarojn pri faktoj ĉe D-ro Kamaryt, sed tute male ĉion aranĝis tiel, ke ĉiu neinformita leganto devas kredi ilin veraj. Kaj tio, laŭ mia kompreno de honesteco, estas aparte malinda falsajo.

Precize al tiu celo servis ankaŭ la laŭdaj vortoj de D-ro Solzbacher pri la laboroj kaj personaj kvalitoj de D-ro Kamaryt. Lia logiko estas simpla: ju pli bele estos prezentita tiu — mi ripetas ĝin — objektivite altvalora kaj nobla homo, des pli granda estos lia prestiĝo ĉe la legantoj, sekve des pli facile kaj des pli efike oni ekspluatos liajn erarajn dirojn, do des pli firme oni enradikigos la kalumnion.

Ĉu D-ro Kamaryt estis misinformita pri Teo Jung?

Ni unue iom esploru la aludon pri s-ro Teo Jung! Antaŭ ĉio estas necese diri, ke D-ro Kamaryt neniam vizitis la oficejon de s-ro Jung kaj sekve ne povis scii ĉu en ĝi troviĝis tiu aŭ alia portreto, aŭ ĝi estas senportreta. Sekve, D-ro Kamaryt devis esti de iu — ne necesas esti saĝulo por diveni de kiu — misinformita pri tiu punkto. La vortoj „eĉ se Jung havis en sia oficejo Hitler-portreton” klare indikas, ke ĉi tie temas pri nenio alia ol pri *responda reago* je iu antaŭa tiusenca misa sugesto aŭ falsa aserto, farita de iu alia persono al D-ro Kamaryt mem, aserto, kiun li *erare* kredis vera, sed tamen konservis dubojn. Tial li skribis „eĉ se Jung” ktp.

La vero estas, ke s-ro Teo Jung, unu el la plej fidelaj kaj meritoplenaj multjaraj laborantoj por Esperanto, redaktoro de Heroldo kaj Honora Membro de UEA, estis *viktimo* de hitlerismo, devis *pro hitlerismo* forlasi sian landon, perdis sian havajon kaj havis pro sia esperantisteco ĉiaspecajn malfacilaĵojn. Do estas ĝuste Jung tiu — same kiel D-ro Kamaryt kaj same kiel multaj aliaj inkluzive min — kiu bone spertis sur si mem almenaŭ parton de la hitlerisma teroro. *Prezenti viktimon de banditismo kiel subtenanton aŭ eĉ membron de krima bando estas unu el la plej abomenindaj agoj.* Kaj utiligi tiucele eĉ la nomon de vere nobla, sed tiurilate misinformita mortinto, por fari la kalumnion pli kredebla, estas vera sakrilegio.

Teo Jung ne estis hitlerano, sed li faris alian gravan „pekon”. Jam antaŭ pluraj jaroj li kuraĝis objektive raporti en Heroldo pri la bedaŭrinda situacio en la usona Esperanto-movado. Kaj tuj, kompreneble, anatemo estis ĵetita sur lin. Tiu sama anatemo, kiun la mondkonata grupeto da individuoj ĉirkaŭ Amerika Esperantisto ĵetas jam dum jaroj sur ĉiun personon aŭ organizaĵon en Usono aŭ ekster ĝi, kiu ne konformiĝas al ĝia diktato kaj al la diktato de tiuj, kiuj staras malantaŭ ĝi kaj finance subtenas ĝin. Do ankaŭ nia Teo Jung — kreu vi aŭ ne — kiu nun estas pentrata al la senpaga legantaro de Amerika Esperantisto tra la mondo kun la „Hitler-portreto” sur sia skribotablo (sic!), estis en 1952 proklamita helpanto „al komunistema flanko de la usona movado” (A.E. septembro-oktobro 1952, p. 76), nome al tiuj demokratiaj kaj sinceraj usonaj esperantistoj, kiuj, ne povinte plu toleri la agojn de la sekretario de EANA, fondis propraincitate kaj sen ies ajn helpo la neŭtralan Esperanto-Ligon por Norda Ameriko (ELNA), pro kio ankaŭ ĝi, denove kompreneble, estis proklamita „komunistema” (sic!). Eĉ pli, la akompana *anglalingva cirkulero*, aldonita al tiu numero de la gazeto Connor-Solzbacher, portis la subtitolon „Ni ne plu akceptas abonojn al „Heroldo” pro ĝia kontraŭ-amerika kaj kontraŭ-EANA politiko” (angle: „*anti-American and anti-EANA policy*”)! Kelkajn jarojn post tio la sama ĵargono estis uzata kontraŭ UEA. Jen nur unu plia floreto el la ĉarma bukedo. En cirkulero, *denove en la angla lingvo*, aldonita al Amerika Esperantisto de septembro-oktobro 1956 (do post la eksigo de Connor el UEA), nia monda neŭtrala organizaĵo estas ankoraŭfoje kalumnie suspektigata nek pli nek malpli ol kiel „fremda agentejo kaj/aŭ kontraŭ-amerika organizaĵo” (angle: „*foreign agency and/or un-American organization*”)!!

Ĉiu, kiu estas nur iom familiara kun la signifo de tiaspecaj esprimoj — kiel *anti-American*, *un-American*, *foreign agency*, „komunismema”, favoranto de „*diversaj adeptoj de la Komunista Manifesto*” (angle: *diverse adherents of the Communist Manifesto*), ktp., ktp. — en la vortaro de la mak-

artisma lingvo de histerio en la kulmina epoko de ĝia florado, komprenos bone ilian danĝeran falsendenuncan karakteron. Se oni konsideras, ke tiuj fiaĵoj estas sisteme sendataj senpage en granda nombro ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla, ne nur al esperantistoj, sed ankaŭ al la usonaj kaj neusonaj ŝtataj aŭtoritatoj, la bildo pri la monstraj formoj de la kampanjo estos kompleta.

Tiel, do, Teo Jung — kune kun multaj lojalaj usonaj kaj neusonaj esperantistoj, kune kun la neŭtrala ELNA kaj la aliaj neŭtralaj asocioj organizitaj en UEA — venis sur la nigran liston de tiu filio de makartismo por la Esperanto-Movado. Kaj kontraŭ lin estis aplikata la sama metodo, kiel kontraŭ ĉiujn aliajn viktimojn: mensogoj, kalumnioj, falsajoj, denuncoj. Feliĉe por la granda usona demokratio, tiu malsano, kiu kaŭzis al la usonaj prestiĝo kaj reputacio en la mondo pli da malbono ol ĉiuj fakte kaj reale ekzistantaj „*un-American*” aktivecoj kune, estas nun energie kuracata de la usona popolo mem, kaj la organismo rapide resaniĝas. Feliĉe, aliflanke, por la Esperanto-Movado, ĝi sukcesis ĝustatempe liberiĝi de tiu sinjoro, kaj nun refreŝigita, pli fortika ol iam en la pasinteco, ĝi marŝas kuraĝe antaŭen al novaj venkoj, helpata de ĉiuj pozitivaj fortoj, inkluzive de Teo Jung.

Pri „Problemoj”

Kiu problemoj kaŝiĝas malantaŭ tiuj enigmaj „Problemoj”, kies malaperon D-ro Kamaryt bedaŭris en la dua alineo de sia citita letero? Kio estis „Problemoj”? Ĉu D-ro Kamaryt fakte sciis kion skribis tiuj problemaj „Problemoj”? Jen tuta aro da minusklaj problemoj, kiujn ni baldaŭ solvos.

„Problemoj” estis pamfleto, eldonata en 1950 *anonime* en New York. D-ro Solzbacher diras, ke ĝin eldonis „kelkaj rifuĝintoj el Orienta Eŭropo” kaj asertas, ke li mem ne kunlaboris (p. 22). Povas esti. Mi tion ne scias. D-ro Solzbacher en ĉiu okazo *bone scias* kiuj estis tiuj t.n. „kelkaj rifuĝintoj”. Alie li ne povus fari la aserton. Sed ankaŭ por ĉiu alia, kiu iam legis tiun fipamfleton kaj kiu renkontis eĉ nur unu solan fojon la saman skribmanieron, kun la samaj lingvaj eraroj, kun la sama mensoga kaj insulta enhavo aliloke, ne estas malfacile diveni kie ĝi estis fabrikata kaj de kiaspecaj individuoj.

Laŭ mia scio, aperis du numeroj: unu en majo kaj la alia en oktobro de la jaro 1950. Kelkan tempon post tio la redaktoroj de Amerika Esperantisto transprenis la flagon de tiuj anonimaj herooj kaj en la sama „brila” stilo neanonime flirtigas ĝin jam kelkajn jarojn, alvokante samtempe per la kvar trumpetoj la pacaman popolon al krucmilito kontraŭ fantomojn, kiujn kreas ilia propra malica aŭ malsana fantazio. Sed la pacama popolo estas hodiaŭ pli prudenta kaj pli inteligenta — kun kelkaj esceptoj, kompreneble — ol ĝi estis iam,

kaj ĝi prefere fidis al faktoj kaj faroj, ol al fabeloj pri fantomoj. Rezulte, la usonaj esperantistoj, malgraŭ la timigaj „admonoj”, gajnis ĉi-jare la unuan premion en la internacia konkurso, ĉar la membraro de UEA pleje kreskis *precize en tiu lando*, dum UEA ankaŭ, kiel tuto, batis ankoraŭfoje, la trian jaron sinsekve, sian propran rekordon!

„Problemoj”, do, antaŭ 8 jaroj (baldaŭ ni povos festi la dekjaran jubileon!) startis la „grandan militon” kontraŭ fantomojn. Ne povante montri ion ajn malbonan aŭ riproĉindan per prezento de faktoj kaj raciaj argumentoj, la anonimaj eldonistoj de „Problemoj” elpensis ĉiaspecajn „danĝerojn”, „minacojn”, „portretojn de Hitler”, „komunistan propagandon”, „agentojn de kvina kolono” kaj similajn stultaĵojn en UEA kaj en la neŭtrala Esperanto-Movado ĝenerale. Superflue diri, ke la pinto de la atakoj estis direktita kontraŭ min mem (komparu la postajn atakojn en A.E.). Kompreneble, ne pro miaj faktaj agoj, tezoj, opinioj aŭ diroj, sed pro tiuj, kiujn *la anonimuloj mem elpensis kaj atribuis al mi aŭ metis en mian buŝon!* Kreinte tiamaniere ian misteran, fantoman, en la realo neekzistantan personecon — produkton de ilia propra fantazio — al kiu ili donis mian nomon, la heroaj anonimuloj eljetis ĉiujn siajn lancojn kaj trapikis — malplenon!

Nun D-ro Solzbacher, publikigante la leteron de D-ro Kamaryt, evidente celas „pruvi”, ke tiu „fantoma kreaĵo” ne estis fantoma, sed reala. Kaj precize tio estas la plua kaŭzo (aŭ la ĉefa, ne gravas) por la publikigo.

Fakte, el la teksto mem de la supre fidele represita letero, dua alineo, sekvas, ke D-ro Kamaryt neniam legis, eĉ ne vidis tiun fipamfleton. Li *erare opiniis*, ke „Problemoj” estis ia demokrata gazeto, kiu luktis kontraŭ hitlerismon, kvankam pri tio tute ne temis, kiel bonege scias ĉiu, en kies manojn ĝi venis. En „Problemoj” de oktobro 1950 estis atakita eĉ „Esperantista”, la tiama organo de la tiama (poste disigita) Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko pro kvazaŭa partopreno en la kvazaŭa, fantoma „komploto”. *Tiun gazeton redaktis neniu alia ol — D-ro Kamaryt mem.* Ĉu estas imageble, ke la sama D-ro Kamaryt povus skribi en la tria alineo, kiun mi nun reproduktos, de la sama letero de la 9-a de aprilo 1952 al D-ro Solzbacher:

„Kaj permesu peton: ĉu vi povus kaj volus diri al mi sincere vian opinionon pri mia redaktado de „Esperantista”. Ĉu nia sinteno tamen iom helpis al esperantista movado ĝenerale?” (Kursivo de I. L.)

Ne, mil fojojn ne: *la sama Kamaryt ne povis en la sama letero bedaŭri en la dua alineo la neaperadon de „Problemoj” kaj en la tria alineo fidi ke lia redaktado de la atakita „Esperantista” tamen iom helpis al esperantista movado ĝenerale.* Ĉar li tamen tion faris, signifas, ke li neniam vidis

la du numerojn de la pamfleta publikaĵo kaj estis erarigita pri ĝia enhavo kaj karaktero.

D-ro Solzbacher ne povis ne scii tion. Por ankoraŭfoje savi sian konsciencon, li tute pretere, en unu nura frazeto, skribis: „Mi ne scias, ĉu D-ro Kamaryt ricevis numerojn de la bulteno aŭ ĉu li nur legis pri ĝi. Ŝajne li pensis, ke mi havis ian rilaton al la bulteno” (temas pri la „Problemoj”). Tamen, en la sama alineo, tuj post formala neo pri sia kunlaboro en tiu „bulteno”, li daŭrigis tiel, kvazaŭ D-ro Kamaryt fakte estus leginta ĝin kaj do, per sia bedaŭro, fakte transforminta la fantomojn en realajn estulojn kaj aprobinta entute la skribadon de tiu „bulteno”. Kaj tio ne estas vera.

Kion fakte pensis D-ro Kamaryt pri neŭtraleco kaj kelkaj aliaj problemoj?

Jen pliaj pruvoj por mia eksplacita aserto, ke D-ro Kamaryt estis de iu erarigita koncerne la karakteron de „Problemoj” kies du numerojn li neniam vidis.

Unue iom pri neŭtraleco.

Tiun demandon mi plurfoje pritraktis en artikoloj kaj paroladoj. La esenco de mia starpunkto estis — kaj plue senkompromise restas — ke UEA kiel organizaĵo *devas esti rigore neŭtrala* rilate diversajn politikajn fluojn, filozofiajn konceptojn kaj religiojn, *sed ke la limoj de neŭtraleco finiĝas precize tie, kie komenciĝas la rektaj atakoj kontraŭ Esperanto fare de unuopuloj aŭ de kia ajn movado.* Tial mi opiniis kaj plue opinias, ke UEA estus devinta preni energian starpunkton kontraŭ hitlerismon. Tiun opinionon mi esprimis, ekzemple, ankaŭ en la artikolo *Neŭtraleco kaj „Neŭtraleco”*, publikigita fine — post kelkaj miaj protestoj ĉe la tiama prezidanto, ĉar la tiama administracio intence haltigis la aperigon de tiu artikolo, verkita de estrarano! — en „Esperanto Internacia”, februaro 1947. En tiu artikolo mi skribis interalie:

„La nazifaŝismo estis la plej granda malamiko de Esperanto jam antaŭ la milito. Ĝi detruis niajn organizaĵojn, ĝi ruinigis aŭ ŝtelis nian havaĵon, ĝi persekutis niajn homojn kien ajn ĝi venis. Cedante, ke eble iuj personoj povas esti neŭtralaj rilate al diversaj opinioj, sintenoj aŭ agoj nekonzernantaj ilin, oni tamen ne povas resti neŭtrala estante rekte tuŝita. Se, ekzemple, du homoj interbatiĝas, la tria — neinteresita aŭ malkuraĝa — povas eble esti neŭtrala. Sed se oni batas lin, al mi ŝajnas, ke li tamen ne restos neŭtrala. Ne defendi sin estante atakata estas pli ol malsaĝe! Tio estas malinda!”

En la sama artikolo mi plue skribis:

„Esti neŭtrala rilate la politikajn partiojn — IEL (Internacia Esperanto Ligo, la tiama granda neŭtrala Esperanto-organizaĵo, kiu en aprilo 1947 kunfandiĝis kun UEA el Genevo sub la nomo Universala Esperanto-Asocio, rim. I. L.) povas kaj devas laŭ sia statuto. Pri tio ne temas. Sed esti neŭtrala rilate la krimon signifas — en la konkreta

kazo certe neintence — solidariĝi kun la krimulo, signifas, fakte, helpi lin kaj lian kriman agadon.”

La tiama administracio de UEA opiniis tiun starpunkton kontraŭa al neŭtraleco kaj esprimis tute klare tiun opinion en postskribo de M. S., publikigita en la sama numero, tuj post mia artikolo. Sed D-ro Kamaryt, kiu ricevis kaj legis ĝin, havis identan starpunkton al la mia. La dua alineo de lia letero estas precize — preskaŭ per la samaj vortoj — aprobo de mia starpunkto. Ĝuste tial li skribis pri la naiveco de la kritiko kaj pri tio, ke oni ne rajtas esti neŭtrala al malbono kaj al krimo de hitleranoj. Tre verŝajne li erare opiniis, ke „Problemoj” havis saman starpunkton kaj tial li bedaŭris, ke ĝi ne plu aperas kaj skribis, ke laŭ lia opinio ĝi estus povinta iniciati diskuton pri neŭtraleco. Sed D-ro Solzbacher, misuzinte la ignoradon de D-ro Kamaryt pri la vera falsendenunca karaktero de „Problemoj” — renversis la sencon de la letero de D-ro Kamaryt kaj tiamaniere plene deformis lian penson.

Plia pruvo:

La 27-an de januaro 1952, do antaŭ ol li skribis la nun pritraktatan leteron al D-ro Solzbacher, D-ro Kamaryt skribis al mi laŭvorte: „Mi legas viajn artikolojn pri la problemoj de la Movado ĉiam kun granda intereso. Viaj konstatoj pri ofte malalta nivelo de esperantistaj grupo-programoj respondas ofte al la efektiva situacio. Bonaj esceptoj estas niaj kluboj en Brno, Praha, Hradec Králové.” **)

En alia letero, tiu de la 18-a de novembro 1952, D-ro Kamaryt gratulis al mi pro la redakto de la raporto pri ISU, aperinta en la novembra numero de „Esperanto”, kaj daŭrigis:

„Kaj en via resumo pri Genocido mi aparte laŭdas klaran redonon de la problemoj kaj tre bonan lingvaĵon. Pardonu, ke mi jam duan fojon tedas vin per miaj laŭdoj. Sed maljuna esperantisto ĝojas, mi ne hontas diri infanece, se aperas post epoko de ia stagno, novaj homoj, kiuj transprenas la torĉon kaj kuras kun ĝi pli entuziasmaj kaj pli spertaj ol estis niatepe ni.”

En la sama letero li aldonis:

„Traleginte ĵus „Rezulto de Unujara laboro” mi ne povas ne enmeti la leteron en la maŝinon por danke gratuli ankaŭ pri ĝi.”

Ĉu estas imageble, ke D-ro Kamaryt povus sendi al mi tiajn gratulleterojn, en kiuj li aprobas miajn artikolojn, kaj samtempe „bedaŭri” la malaperon de „Problemoj” kun ĝiaj insultoj kaj kalumnioj kontraŭ min? Kaj ĉio-ĉi ne en diversaj periodoj, sed en la sama jaro. Oni memoru bone, ke D-ro Kamaryt ne estis hipokritulo, sed „akra observanto, serioza amiko de scienco, literaturo kaj kulturo, vera demokrato, nobla homo”, kiel tion rekonas eĉ D-ro Solzbacher en sia artikolo.

Kiam la stalinismaj reĝimoj prenis rekte negativan starpunkton rilate Esperanton kaj en diversaj

landoj malpermesis la Esperanto-organizaĵojn, ĉefe post la konataj artikoloj de Stalin pri lingvistiko, mi samopiniis kun la aliaj tiamaĵ estraranoj, pro la samaj principaj limoj de nia neŭtraleco, prezentitaj supre, ke UEA devus ion fari por klare difini sian pozicion. Rezulte de plursemajna skriba rilatado inter la tiamaĵ estraranoj, kiel ankaŭ rezulte de longa diskuto en la Paska estrara kunsido (1952), estis unuanime akceptita la „Nefermita Letero al J. V. Stalin”. Ĝi aperis en la junia numero de „Esperanto” de la jaro 1952. En la kadro de tiu ĉi artikolo mi ne deziras analizi la pravecon de tiu kontraŭstalinisma letero, kiun la sofisma logiko de D-ro Solzbacher klopodas nun — do plenajn kvin jarojn post la publikigo kaj post kiam la Komitato de UEA, inkluzive la tiaman komitatanon G. A. Connor, aprobis ĝin — misprezenti nek pli nek malpli ol kiel esprimon de ia stalinisma koncepto (sic, sic!) por povi en sia malico kaj kun evidenta, plian fojon falsadenunca intenco apudmeti mian nomon kun tiu de Stalin sur la kovrilpaĝon de A.E. Mi nur deziras atentigi, ke tiu sama letero aperis poste en pluraj gazetoj kaj revuoj nacilingvaj ĉu komplete, ĉu parte, aŭ estis favore komentariata, ekzemple en la plej grava sendependa franca gazeto „Le Monde” de la 26-a de junio 1952. Eĉ la Brita Radio (BBC) trovis ĝin tiel bona kaj trafa, ke ĝi disaŭdigis ĝin en pluraj lingvoj. Vere maloftega evento ĉe la Brita Radio kiam temas pri Esperanto! Post la malkovro de tiu gravega „sekreto” ni povas atendi, ke la brilaj redaktoroj de Amerika Esperantisto suspektigos BBC pro komploto „stalinisma”, verŝajne sub influo de mia „retorika kapablo”!!! Nu ni lasu tion kaj revenu al D-ro Kamaryt, kiu en sia letero de la 18-a de oktobro 1953 skribis al mi:

„Mi konjektas, ke aŭtoro de la Nefermita Letero estas vi, aŭ almenaŭ ke via kontribuo al la teksto estis la plej grava. Tial mi permesas al mi gratuli vin pro la eminenta laboro. Precipe la citaĵoj estas tre bone elektitaj. Mi volonte sciis, kie la teksto estis publikigita en la angla kaj en la franca lingvoj.”

Kaj D-ro Kamaryt, kiel prave rekonas eĉ D-ro Solzbacher, estis „serioza amiko de scienco, literaturo kaj kulturo”. Jes, D-ro Kamaryt estis tia. Kaj li estis ankaŭ „Esperanto-pioniro laboranta kun sistemo kaj persisto”, senkompromisa integra esperantisto, kiu luktis la tutan vivon ne nur por disvastigo de la lingvo, sed ankaŭ kontraŭ ĉiujn, kiuj atakis ĝin, tute egale de kiu flanko venis la atako. Li bone komprenis, ke UEA kaj la neŭtrala movado ĝenerale ne povas esti neŭtrala, kiam temas pri atakoj kontraŭ Esperanton aŭ la Esperanto-Movadon. Tial li aprobis mian negativan starpunkton en ambaŭ kazoj: tiu de hitlerismo kaj tiu de stalinismo.

Pro mia agado en la Esperanto-Movado — tiu sama agado, kontraŭ kiun unue „Problemoj” kaj

de nia komuna afero" (poŝtkarto de la 13-a de julio 1953).

Okaze de mia artikolo „Krizo de nia literaturo” D-ro Kamaryt sendis al mi longan leteron la 24-an de aprilo 1953, en kiu li plendis, ke la antaŭa administracio de UEA, miskomprenante la neŭtralecon de la Asocio, ne volis mencii, malgraŭ liaj protestoj, en la Jarlibro ion ajn pri la tiamaj publikajoj „Konstitucio” kaj „Lerneja reformo”, aperintaj en la Ĉeĥoslovaka Respubliko. Tiun leteron li finis per la vortoj: „Nia Movado ne pereos, kiam aliĝas al ĝi homoj de via speco”.

Fine, por citi nur ankoraŭ unu leteron, post la sukceso en Montevideo D-ro Kamaryt sendis al mi la 16-an de januaro 1955 gratulleteron, en kiu li mencias la raporton, kiun kompilis f-ino Vermaas el miaj tiutempaj leteroj el Montevideo al la tiamaj prezidanto, s-ro Malmgren. Tiu raporto estis multobligita, broŝurita kaj sendita al diversaj kunlaborantoj en la UNESKO-afero.

En sia gratulletero D-ro Kamaryt skribis:

„Pardonu, ke mia letero ne estas tro regula laŭforme. Mi ploraĉis, leginte ĝin (forstrekita kaj anstataŭ „ĝin” estas metite „tiun broŝuron”, rim. I. L.). Pardonu al maljunulaĉo, kaj diru gratulojn al s-ino Vermaas, kiu kompilis la broŝuron modele.”

Kaj aliloke en la sama letero:

„La baloto de UNESKO estas efektiva venko, kian nia Movado ĝis nun neniam akiris. Oni ne povas eldiri pri tio vortojn troigantajn. Permesu, ke danku vin kortuŝita viro maljuna. Jes, suriris scenejon nova generacio, kiu superas nin, forirantajn. Ili floru!”

Tiujn vortojn kaj multajn similajn skribis D-ro Kamaryt. *Kaj li ne estis hipokritulo, sed „akra observanto, serioza amiko de scienco, literaturo kaj kulturo, vera demokrato, nobla homo”.* Tia homo neniam, mi ripetas kaj substrekas neniam, estus povinta veni eĉ al ideo bedaŭri la malaperon de „Problemoj”, tiu malnobla anonima fipamfleto, kiu elverŝis sian venenon ĉefe kontraŭ min!

Mi deziras forte emfazi, ke mi neniam venus al ideo publikigi la suprajn eltiraĵojn el la leteroj de D-ro Kamaryt koncerne min mem, se la misuzo de lia nomo fare de D-ro Solzbacher ne estus deviginta min fari tion.

Por forviŝi kotmakulon, ĵetitan sur la brilan nomon de D-ro Stanislav Kamaryt mi skribis tiujn liniojn.

Prof. D-ro Ivo Lapenna

*) Bonvolu legi la nomon de D-ro Kamaryt ĉie en ĉi tiu artikolo kun supersigno sur la antaŭlasta litero.

**) La kursivo en tiu ĉi kaj en la aliaj citataj leteroj de D-ro Kamaryt estas de I. L.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1957

Stato je la 31-a de decembro 1957

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Usono	2016	3225	159.97
2.	Danlando	1910	2743	143.61
3.	Hispanujo	2092	2508	119.88
4.	Francujo	6575	7647	116.30
5.	Svislando	1910	2185	114.39
6.	Nederlando	4894	5567	113.75
7.	Italujo	3620	4030	111.32
8.	Jugoslavio	3563	3800	106.65
9.	Germanujo	6515	6865	105.37
10.	Finnlando	2687	2765	102.90
11.	Norvegujo	2113	2144	101.46
12.	Svedujo	6895	6945	100.72
13.	Brazilo	6985	7011	100.37

Plej koran gratulon al la gajnintaj landoj! Usono sendube meritas apartan laŭdon, ĉar malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj ĝi atingis kaj ĝis la fino konservis la plej altan lokon. Ĝi brile sukcesis redoni la fidon al sennombraj usonaj esperantistoj. Ne malpli kore ni gratulas al Argentino, kiu post intervalo de kelkaj jaroj denove partoprenis. Ĝi subite saltis al la supro per energia varbado de dumvivaj membroj! La perantoj en ambaŭ landoj disponas pri librodonado en valoro de 100. —gld. por divido aŭ lotumo inter la delegitoj kaj kunlaborantoj.

Sed ankaŭ la aliaj landoj, kiuj atingis altajn pocentojn, meritas laŭdon. Kun ĝojo ni konstatas, ke en Konkurso I preskaŭ ĉiuj pasis 100 %. Nur

14.	Belgujo	1952	1907	97.69
15.	Britujo	7351	6963	94.72

Konkurso II


	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Argentino	745	1005	134.89
2.	Urugvajo	325	414	127.38
3.	Aŭstralio	1025	1228	119.80
4.	Aŭstrujo	1400	1505	107.50
5.	Japanujo	1210	1280	103.78
6.	Sudafriko	230	235	102.17
7.	Novzelando	942	955	101.38
8.	Portugalujo	580	560	96.55
9.	Kanado	500	440	88.—
10.	Izraelo	290	240	82.76
11.	Islando	405	315	77.78
12.	Maroko	1061	659	62.11

du landoj ne atingis tiun limon. Ni fidas, ke en la venonta jaro ili kompensos tion per alta salto. En Konkurso II pli ol la duono ankaŭ pasis 100 %. El la aliaj kelkaj laboras en tre malfacilaj cirkonstancoj. Ni esperu, ke ankaŭ ili baldaŭ havos okazon progresi.

Intertempe ni jam startis por la novaj Konkursoj. Ek al batal'! Vi konas la regulojn: AM = 1 poento; MJ = 5 pt.; MA = 10 pt.; MS = 15 pt.; Pat. kaj DM = 50 pt. J-MJ kaj J-MA estas kalkulataj kiel MJ kaj MA. En 1958 partoprenos ankaŭ Pollando. Sukceson al ĉiuj deziras

M. H. VERMAAS
Direktorino C.O.

Germanaj Katedraloj



Se oni parolas pri la okcidentaj nacioj kaj pri iliaj artaj atingoj, oni povas karakterizi ĉiun popolon per arkitektura esprimo universale konata en la tuta mondo.

Tiu, kiu pensas pri Grekujo, tuj memoras pri la antikvaj temploj. Kun Italujo estas strikte ligita la bildo de la romanaj monumentaj konstruaĵoj kaj de la renesancaj kaj barokaj palacoj. La genio de Francujo simboleĝas en la gotika katedralo. La spirito de la germana konstruado fine speguliĝas en la mezepokaj katedraloj romanaj kaj gotikaj.

La „Cathedrale“ en Francujo kaj la „Dom“ (ambaŭ = katedralo) en Germanujo havas la saman signifon. La nomo montras, ke ili estis „domo“ kaj pompa preĝejo de ĉefepiskopa aŭ episkopa loĝurbo. Ĉar en la germana mezepoko ĉefepiskopo regule estis persono kun granda politika influo (la Mainz-aj kaj Kolonjaj ekleziestroj ekz. estis ĉefkancelieroj de la „Sankta Romana Imperio de la Germana Nacio“), li klopodis per sia katedralo ankaŭ montri sian eksteran potencon. Similaj idealoj instigis la mezepokajn reĝojn kaj imperiestrojn al granda ŝtata subteno de ĉiuj projektoj de katedrala konstruo.

Kiam, pli poste, tiuj aristokratoj perdis sian influon, ili estis anstataŭigitaj de urbanaroj kaj civitanaroj, kiuj volonte oferadis, por ke oni povu ekkonstrui novajn, pompajn katedralojn. La „konstrukabanoj“ en la ombro de la katedraloj altiris la plej signifajn artistojn kaj la plej bonajn metiistojn tiel, ke la katedraloj kaj iliaj ornamaj fariĝis centroj kaj monumentoj de la germana arta historio.

Ĉiu amiko de la arto vidas kun ĝojo, ke la plejmulto de la germanaj katedraloj travivis la lastan militon pli malpli nevunditaj. Grandajn difektojn, kiuj intertempe estis riparitaj, nur ricevis la katedraloj en Kolonjo, Trier, Essen, Münster kaj Paderborn. La imperiestraj katedraloj en Mainz kaj Worms staris savataj en historiaj kvartaloj, kiuj estas rekonstruataj. La aliaj famaj katedraloj en Speyer, Limburg, Bamberg, Freiburg, Ulm kaj Regensburg starigas siajn graciajn turojn netuŝataj en la ĉielo.

Ĉiuj germanaj katedraloj vidadis ekde sia fondiĝo multajn similajn katastrofojn, revoluciojn, festojn de paco kaj festacojn de milito kaj teruro. Ili travivis orajn tagojn kaj tragikajn momentojn, ili aŭdis la preĝojn de piaj pilgrimantoj kiel la fivortojn de blasfemantaj rabistoj.

Same kiel la germano aspektas diversa en ĉiu regiono de Germanujo rilate al vestaĵoj, dialekto kaj kutimoj, tiel ankaŭ la katedraloj montriĝas diversaj laŭ historio kaj stilo. Ĉiu el ili havas specialan arkitekturan belecon kaj karakterojn.

La plej aĝaj troviĝas en Rejnlando. La palaca kapelo de Karlo la Granda, kiu estas la kerno de la katedralo en Aachen, estas ankoraŭ simbolo de la frumezepoka konstruado, baziĝante sur antikva romana tradicio. La imperiestraj katedraloj en Mainz, Worms kaj Speyer spegulas la mirindajn eblecojn de esprimo de la romana arkitekturo ekde la fino de la karolinga epoko. La Ottona, Staufa kaj Salia epokoj grandigis tiujn katedralojn je ĉiuj flankoj kaj finkonstruis la turojn ĉiam pli grandioze.

La okangula turo kaj okcidenta horejo de la Mainza katedralo formas kupolon, kiu ne havas same elegantan kaj harmonian egalon en la tuta Germanujo. Per la uzo de ruĝo kaj flava sabloŝtono oni ricevas unikan kolorefikon dum la leviĝo kaj malleviĝo de la suno aŭ dum festa iluminado.


En la katedralo de Bamberg (Bavarujo) troviĝas jam kelkaj gotikaj elementoj, kiel ekz. pintarkoj. Ankaŭ la mondkonata „Bamberga rajdanto“ estas reprezentanto de frugotika arto.

Dum la 13a kaj 14a jarcentoj la fondoŝtonoj de la katedraloj de Kolonjo, Frankfurto, Ulm, Regensburg, Freiburg kaj Strasburgo estis metitaj. Iliaj konstruaj planoj estis tiel ampleksaj, ke la fondintoj kaj unuaj arkitektoj ne povis antaŭvidi la finon de la konstruado. Malgraŭ la oferemo de generacioj multaj katedraloj estis nefinitaj, kiam en la 15a jarcento la renesanca stilo antaŭenmarŝis de la sudo.

En Kolonjo la konstruarkano sur la turostumpoj estis urba simbolo ĝis la 19a jarcento. En Regensburg la lasta arkitekta majstro en la 16a jarcento vane luktis kaj polemikis por ricevi la necesajn rimedojn por fini la katedralon. Fine li ribelis kontraŭ la urbo kaj imperiestro kaj oni senkapigis lin antaŭ la pordego de lia katedralo.

La laborejo de la katedralarkitektoj ĉiam estis ĉirkaŭita de sekretoj kaj eĉ hodiaŭ oni ne konas kelkajn manierojn, per kiuj la majstroj solvis ŝajne senpene diversajn konstruproblemojn. Nur la germanaj gotikistoj realigis la ideon de la unutura fasado, per kiu la tuto de la konstruaĵo leviĝas ĉielen. Per ĉi tiuj turoj la germana katedrala konstruado festas siajn lastajn kaj plej grandajn triumfojn.

(Tradukis Lovoko)



..... parenco de la direktoro.”



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:

Nicola Minnaja,

Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

LABOR-KAMPO ĈE CEILLAC (FRANCUJO)

Ceillac estas vilaĝo en la Alpa regiono de Francujo, kiu grave inundiĝis en la frua somero de 1957. 40 farmbienoj estis kovritaj de koto kaj ŝlimajo, dum la tri-kvar mil vilaĝanoj devis foriri por trovi ŝirmajon aliloke.

Oni vivas tre simple ĉe Ceillac, per agrikulturo kaj per la bestoj kiujn oni paŝtas sur la deklivoj de la montoj. Spite la katastrofon oni devis daŭrigi la sezonan laboron, sed estis absolute necese, ke oni forigu la koton kiu plenigis la stalojn kaj la teretaĝojn de la domoj, ĉar tie dumvintre oni prizorgas la bestojn, de kiuj oni dependas por vivrimedo.

La aŭtoritatoj petis, ke Internacia Civila Servo (S.C.I.) venigu gevolontulojn por forigi la koton, kaj por nia negranda privata asocio estas triumfo, ke nur unu monaton post la katastrofo venis volontuloj. Entute servis 200 gevolontuloj, ĉiu dum minimume du semajnoj, kaj oni forigis 1700 kubajn metrojn da koto, riparis la vojon, kaj konstruis provizorajn pontojn tra la rivero por ke oni atingu la kampojn.

Interalie venis 10 esperantistoj el Pollando, kiuj starigis iom malfacilan lingvan problemon, ĉar plejparte ili ne komprenis iun ajn lingvon de okcidenta lando. Ŝajne oni tute ne uzis Esperanton en Ceillac, krom kiam s-ro Gerrier ekvizitis la laborkampon, sed tio ne multe gravis. Esperanto estis la lingvo, per kiu oni varbis la polajn volontulojn kaj faris ĉiujn aranĝojn por ilia vizito, kaj certe estus venintaj pli, se ili estus ekhavintaj ĝustatempe la vizojn. Entute venis 120 demandoj kaj kvardek servadpetoj ktp., kiuj grandparte rezultis de anoncetoj, kiujn s-ro Gerrier (Parizo) publikigis en la Esperanta gazetaro.

Ĉio ĉi forte impresis la gvidantaron de S.C.I., kaj oni decidis, ke ĉijare okazu eksperimenta laborkampo en kiu la ĉefa lingvo estos Esperanto. Tre verŝajne ĝi okazos en Pollando, kie ĝis nun S.C.I. havas tre limigitan kontakton, kaj se sufiĉe da esperantistoj interesiĝos, estos ebleco ankaŭ en iu okcidenta lando (vidu la januaran numeron de L.J.V.-Red.)

Ni ne multe atentis pri lingva kapablo, se junul(in)o estas laborema, vigla, preta fari sian eblon pri la socia tasko dum periodo de du semajnoj aŭ pli. Kaj se la unua laborkampo sukcesos, Esperanto firmiĝos en nova kampo.

Sed se ĝi fiaskos, necesos multjara laborado por reĝajni la nunan pozicion.

Informon donas Service Civil Interna-

tional (E-fako), 77 Boulevard Jean-Jaurès, Clichy (Seine; Francujo).

La 3-an de decembro 14 personoj estis sin anoncintaj por la laborkampo en Pollando. **Tom Woodall** (Britujo)

NOVAĴOJ EL ZAGREBO

En Zagrebo, Kroatio, la 8-an de decembro 1957-a okazis kunveno de reprezentantoj de ĉiuj junularaj grupoj de la urbo mem. Ĉeestis ankaŭ samideanoj Dobčnik, reprezentanto de Jugoslaviana Esperanto Federacio, kaj Rehoric, prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo. Estas pritraktitaj gravaj problemoj de esperantista junulara movado en Zagrebo kaj en tuta Kroatio. Por koordini tutan laboron de ĉiuj junulaj grupoj en Zagreb estas elektita urba komitato. Ankaŭ estas fondita respublika junulara komisiono por Kroatio, kiun eniris Osibov Ivo, Preksavec Stanko kaj Brajčić Nevenka, konataj esperantistaj junularaj gvidantoj.

La 13-an de decembro, por memori la naskiĝtagon de Zamenhof, junulara esperantista grupo de Laborista Esperanto-Societo aranĝis interesan ekspozicion kun libroj, gazetoj, bildoj kaj aliaj esperantaĵoj. Lokaj gazetoj raportis pri ĝi, kaj la Radio stacio anoncis ĝian malfermon. El la vizitantoj, multaj neesperantistoj esprimis la deziron lerni Esperanton. **more**

SOMERA

ESPERANTO-TENDARO EN ĈEĤOSLOVAKUJO

La Esperanto-junularo en Ĉeĥoslovakujo intencas aranĝi ankaŭ en 1958 Someran Esperanto-Tendaron (eventuale kelkajn). SET estas aranĝata ĉiujare de 1952 kaj pri ĝia populareco atestas la fakto, ke ĉiam oni devas malakcepti plurajn aliĝintojn pro manko de loko. De 1956 partoprenas ĝin ankaŭ elektitaj kaj inviritaj gejunuloj el eksterlando. En SET oni instruas la gramatikon, historion kaj literaturon de Esperanto kaj ĉe la fino ekzamenas la kursanojn. La posttagmezoj kaj vesperoj estas dediĉataj al refreŝiĝo en la naturo — SET ja kutime okazas ie en la arbaroj aŭ sub montoj. Pri SET 1958 montris jam vigran intereson junaj samideanoj en Moskvo.

Jaroslav Marik

ESPERANTA SEMINARIO EN PRAGO

La junularo de la Esperantista Klubo en Prago (Ĉeĥoslovakujo) aranĝis de la 26-a ĝis la 29-a de novembro 1957-a serion de ĉiutagaĵaj prelegoj (seminarion), kiun finis sabaton la 30-an amuza ves-

pero kun artisma programo („Verda Ĉaro de J. Baghy” kaj profesiaj artistoj) kun tambolo kaj danco. Por la amuza vespero, kun ĉeesto de 200 personoj, venis junuloj ankaŭ de ekster Prago, sume el 30 lokoj, el kiuj Košice estas la plej malproksima (718 km.). Tiu ĉi decembra amuzvespero en Prago okazas jam de pluraj jaroj, kaj videble, ĝi havas bonan tradicion. La postan dimanĉon la partoprenintoj aranĝis laborkunvenon, diskutante pri la problemoj de la ĝenerala kaj junulara Esperanto-movadoj.

DU GAZETOJ POR LA JUNULARO

Kiel jam anoncite, ek de la 1-a de novembro 1957-a aperas revuo por esperantistaj studentoj, „Stud. esp.”, kun la kunlaboro de universitataj studentoj ĉe la universitatoj de Kembriĝo, Kopenhago, Pizo, Salzburg kaj Zagrebo. Ĉiu universitata klubo pretigas difinitan nombron da stencilitaj paĝoj. La rezulto de ĉi tiu iom fragmenta kunlaboro en la unua numero estas sendube kuraĝiginda. La artikoloj estas variaj; poemoj, recenzoj, informoj. Malgraŭ la diversteknikaj stenciligoj de la diversaj paĝoj, ankaŭ la ekstera aspekto de la revuo ne estas malplaĉa; ankaŭ ĝi respegulas la senperan kunlaboron de la studentaj kluboj, kio estas verŝajne la plej simpatia karakterizo de ĉi tiu revuo. Estas dezirinde, ke ankaŭ aliaj studentaj kluboj partoprenu ĉi tiun iniciaton, tiel ke ĉiu numero povos pliampleksiĝi kaj ĝia enhavo interesi pli grandan nombron da studentoj. La unua numero estis 13-paĝa; la paĝonombro varios laŭ la nombro de la kunlaborantaj kluboj. Kvankam la kopioj ĝenerale estas rezervitaj por la kunlaborantaj kluboj proporcie al ilia kontribuo, ankaŭ aliaj personoj povas ricevi ekzemplerojn de la gazeto mendante ilin kontraŭ po unu respondkuponon ĉe SEK Kopenhago, ĉe Jens Falkentorp, Hattensens Allé 5, København (Danujo).

Speciale dediĉita al la geknaboj estas „La juna Esperantisto”, eldonita de Haga Esperanto-Kunlabor-Komitato. Oni eĉ povus diri, ke ĝi estas speciale por la nederlandaj geknaboj, kiel montras la tradukoj en la nederlandan lingvon de la plej maloftaj vortoj kaj la resumoj nederlandlingvaj de la artikoloj pri nia movado; sed la multenombraj abonantoj el pluraj aliaj landoj klare montras, ke ĝi povas preskaŭ egale bone taŭgi por la tuta mondo. Ĉiu numero estas 8-paĝa kaj mimeografita; la ofta aperado (du-semajna) ebligas daŭran kontakton kun la legantaro. La abonprezo (12 steloj aŭ 10 respondkuponoj, por Orienta Eŭropo anstataŭeblaj per filatelaj poŝtmarkoj) estas tre malalta; oni povas pagi ĝin ĉe ĝirkonto 6304 de „La juna esperantisto”, Den Haag (Nederlandoj) aŭ al la administranto, Hoeffbladlaan 107, Den Haag (Nederlandoj). Al la kuraĝa gazeto, kiu jam dum unu tuta jaro regule aperadis, plenigante mankon en nia gazetaro, kiu ne interesiĝas sufiĉe pri la geknaboj, oni povas nur deziri prosperan daŭrigon.

N. M.



43-a
UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO

MAINZ
GERMANUJO
2-9. 8. 1958

43-A UNIVERSALA KONGRESO

Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 —
Germanujo

OFICIALA KOMUNIKO

Suplemento al N-ro 3 Decembro 1957

Nova karavano:

Anoncis karavanon:

— Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Parizo.

Urbaj tramoj:

La Urbo Mainz decidis disponigi al la kongresanoj specialan tramkarton, validan sur ĉiuj urbaj linioj dum la tuta kongresa semajno, je kosto de 5 markoj. La karto estos aĉetebla en la kongresejo.

Nova filmo en Esperanto:

Pri la urbo Braunschweig estas nun eldonata nova filmo originala en Esperanto. Ĝi estas montrata, kune kun aliaj Esperanto-filmoj, dum la Kongreso.

Internacia CSEH-seminario:

Sub la oficialaj aŭspicioj de la Urbo Mainz, de la 31 julio—2 aŭgusto 1958 okazos Internacia Seminario por prepari kursgvidantojn laŭ rekta metodo, gvidota persone de S-ro Andreo Cseh. La lecionoj okazos dum tri tagoj, matene de la 9.30 h.—12.30 h. kaj posttagmeze de la 3-a h.—6-a h.

La kostoj de la kurso kun atesto pri partopreno estas 9 markoj (30 steloj). En la restoracio de la kursejo oni povas ricevi la du ĉefmanĝojn (tagmanĝon kaj vespermanĝon) por 5,50 markoj tage: entute 16,50 markoj (55 steloj).

Detaloj sekvas en la Dua Oficiala Bulteno. Por informoj: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

Magnetofona invito:

La Urbestro de Mainz, S-ro Franz Stein, surbendigis sur magnetofona rubando oficialan invitsaluton en Esperanto, direktitan al la Esperantistoj en la tuta mondo. Esperanto-societoj aliĝintaj al Landa Asocio povas senpage ricevi la bendon „La Urbestro de Mainz invitas la esperantistojn” (rapideco 9,5), mendante ĝin per simpla poŝtkarto ĉe kongresa oficejo.

Statistikoj:

Ĝis la 19-a de decembro 1957 aliĝis 462 kongresanoj el 26 landoj.

N-ro 4

Januaro 1958

Novaj karavanoj:

Anoncis karavanon:

- Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Avenue, Londono;
- Itala Esperanto-Federacio, Corso Galileo Galilei 22, Torino.

Ekskursoj:

Dum la Kongreso okazos jenaj samtempaj tuttagaj ekskursoj:

1. perŝipe sur la romantika Rejno, preter la fabela Lorelei, kun vizito ŝnurfervoja al „Germania” kaj tagmanĝo en Bacharach/Steeg.
2. Per speciala vagonaro kun danckupeoj al la pentrinda Heidelberg, kun tagmanĝo en la Festhalo de Eberbach.
3. Per aŭtobuso, veturante en la montara Taunus regiono, al la naskiĝurbo de Goethe, Frankfurto, kun akcepto en la Urbodomo kaj tagmanĝo en la ekzotika Palmĝardeno.

Du postkongresaj ekskursoj iros:

1. Kvartage al la folkloraj montoj de Bavarujo kaj Tirolo.
2. Tritage al la Mondekspozicio en Bruselo.

Dumtagaj vizitoj tra Mainz kaj Wiesbaden okazos dum la Kongreso.

Junula vespero:

La Loka Kongresa Komitato decidis oficialigi kaj subteni dumkongresan amuzan vesperon por gejunuloj, organizata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO).

Literatura kaso:

Alte taksante la signifon de la Esperanto-Literaturo por la progresigo kaj fina venko de Esperanto, la Loka Kongresa Komitato decidis asigni al la Literatura Kaso, kiu konsistigas la premiojn por la Belartaj Konkursoj, la sumon de 100 markoj. LKK invitas ĉiun esperantiston donace subteni la Literaturan Kason.

Statistikoj:

(ĝis fino de decembro) Aŭstrujo 16, Belgujo 7, Brazilo 3, Britujo 38, Bulgarujo 3, Danlando 9, Etiopio 1, Finnlando 1, Francujo 132, Germanujo 272, Grekujo 1, Hispanujo 6, Israelo 1, Italujo 27, Japanujo 2, Jugoslavio 26, Maroko 2, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 39, Norvegujo 7, Novzelando 1, Pollando 5, Svedujo 48, Svisujo 23, Urugvajo 1, Usono 5.

Entute 680 el 27 landoj (Samdate: en Marseille 480 el 27 landoj; en Kopenhago 581 el 24 landoj).

Lasta informo: Ĝis 15-1-58 aliĝis 931 personoj.

Konstanta Kongresa Sekretario
G. C. FIGHIERA,

SEMINARIO POR CSEH-METODAJ INSTRUISTOJ

31 julio—2 aŭgusto 1958, Mainz

La ĉefa celo de la Internacia Esperanto-Instituto, starigita en la komenco de la jaro 1930, estis eduki Esperanto-instruistojn, kiuj deziras instrui laŭ Cseh-metodo. Kiam s-ro Andreo Cseh komencis instrui Esperanton en la jaro 1920 en Hermannstads, Transilvanio, li konstatis, ke liaj kursanoj apartenas al diversaj nacioj kaj krome, ke la plej granda parto el ili estas laboristoj, homoj, kiuj tamen havis la energion vespere lerni Esperanton post tago de peza laboro.

La diversnacieco kaŭzis, ke li ne povis uzi lernolibron, do li devis konstrui iun specon de rekta metodo. Rektaj metodoj estas sufiĉaj, sed en ĉi tiu kazo ĝi devus esti speciala rekta metodo, ĉar la plej multaj lernantoj estis jam lacaj kaj certe baldaŭ endormiĝus, se la instruisto ne povus kateni la kursanojn per vigla kaj amuza instruado.

Tiamaniere la kurso fariĝis kvazaŭ agrabla kaj sprita interparolado kun la lernantoj; li prenis temojn el la ĉiutaga vivo kaj lasis ilin rakonti pri sia familio, pri sia hundo aŭ kato, k.t.p. Multaj ŝercoj spicis la lecionojn, kiujn Andreo Cseh neniam nomis lecionoj, sed konversacioj. Fakto estas, ke neniu kursano iam forrestis, male, tiel ke la fotoj de la lasta konversacio montris pli da kursanoj ol estis en la unua leciono. Multaj kursanoj alportis siajn amikojn en la daŭro de la kurso.

Sed... malgraŭ tio, ke ŝajne ili ne lernas ion, nur amuziĝas, la instruado estas treege serioza kaj la metodo tiel perfekta, ke iu regna ĉefinspektoro de instruado en Nederlando, aŭdinte pri la sukcesoj de la kursoj, vizitis plenan kurson, konsistantan el 40 lecionhoroj. Li faris tion inkognite kaj post la fino li verkis tre interesan artikolon pri la supereco de la metodo. Li tre klare analizis la metodon. La Esperanto-traduko de tiu artikolo estas senpage havebla ĉe la Instituto.

La esenco de la metodo estas, ke la gramatikaj eroj estas demonstraciataj, tiel ke ankaŭ tiuj personoj, kiuj forĝis sian gramatikon tamen povas facile kompreni ĝin. Neniam s-ro Cseh asertis, ke la kursanoj post tiu 40-hora kurso estas perfektaj Esperantistoj, sed ili kuraĝas paroli, ĉar de la unua leciono ili devas hore respondi en Esperanto. Certe, la instruado estas ne facila por la instruisto, sed la rikolto estas ankaŭ por li tre ĝojiga. Alia avantaĝo estas, ke ĉiuj kursanoj havas grandan entuziasmon por daŭrigi la studadon. Estas la tasko de la lokaj organizaĵoj tuj post la Cseh-kurso aranĝi daŭrigan kurson kun lernolibro.

La spertoj montris, ke post tia amasa instruado, multegaj novaj entuziasmaj gesamideanoj plenigis la vicojn en nia movado, tiel ke la kluboj kaj asocioj ricevis novan sangon, la eldonistoj aĉetantojn kaj la Esperanto-Kongresoj partoprenantojn. Bedaŭrinde nuntempe tre mankas Cseh-instruistoj, kiuj povas vojaĝi de lando al lando. Antaŭ la milito la

Instituto disponis pri 479 Cseh-metodaj geinstruistoj, el kiuj kelkaj dekoj da internaciaj, vojaĝantaj instruistoj. Nun nur kelkaj, cetere tre bonaj, ekzistas ankoraŭ, sed ofte ili eĉ ne havas tempon vojaĝi al aliaj landoj. Tial estas ĝojiga fakto, ke U.E.A. invitis s-ron Cseh doni seminarion en kunligo kun la Kongreso, tiel ke multaj povos partopreni. Tiuj, kiuj emas instrui laŭ Cseh-metodo, ĉu en sia propra lando, ĉu eksterlande, havas nun bonan okazon lerni la metodon. Estas preferinde, ke la partoprenantoj jam konu la Cseh-kurson aŭ almenaŭ estas informitaj pri ĝi, sed nepre necesa tio ne estas.

Ĉi sube sekvas la detaloj pri la seminario:

La Internacia Seminario okazos, sub aŭspicioj de la urbo Mainz, de la 31-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1958 en Mainz.

Unua leciono: jaŭdon je 9.30 horo.

Lasta leciono: sabaton posttagmeze, de 15. a h. ĝis 18. a h.

La lecionoj okazas ĉiutage de 9.30 h. ĝis 12.30 h.; posttagmeze de 15. a h. ĝis 18. a h., ĉiam kun paŭzo en la mezo. Do entute estas 18 lecionhoroj.

Loko kaj manĝo.

La seminario okazos en salono de la kongresejo „Palaco de la Elektantaj Princoj“, Mainz.

Ĉar en la Palaco funkcias bona restoracio, la partoprenantoj povos ankaŭ manĝi tie kaj je tre favoraj prezoj.

La seminarianoj povos ricevi tag- kaj vespermanĝon, varman aŭ malvarman laŭvole. La prezo de tag- kaj vespermanĝo kune estas 5,50 markoj tage. Tamen oni ne estas devigata manĝi tie.

Loĝo

La seminarianoj devas mem elekti la tipon de loĝado, kiun ili preferas, laŭ jenaj prezoj:

Hoteloj en kategorio A de 7 ĝis 10 markoj ĉiutage; en kategorio B de 10 ĝis 15 markoj kaj en kategorio C de pli ol 16 markoj.

Ĉe privatuloj: 6 markoj. La prezoj entenas impostojn kaj servmonon, ankaŭ matenmanĝon.

Unu stelo egalas 0,30 markoj.

Kotizo

La kotizo de la seminario kun atesto pri partopreno estas 30 steloj aŭ 9 markoj.

Aliĝoj

Aliĝoj al la seminario devas okazi ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

La kotizon bonvolu sendi al la 43-a Universala Kongreso de Esperanto, Mainz, Germanujo.

Loĝigo ankaŭ en studentaj loĝejoj okazos pere de la Un. Kongreso. Antaŭpagoj por la loĝejoj ne estas necesaj.

Pri ĉiuj aliaj aferoj la korespondon direktu al la Internacia Esperanto-Instituto.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: Dro V. Faigl, Zlonice,
Ĉeĥoslovakio

Saka fakterminaro

Jam antaŭ la milito oni planis eldonon de ŝaka fakterminaro. Post la milito estis starigita komisiono, kiu tuj eklaboris. Bedaŭrinde, la komisiono ne sukcesis finisian laboron, ĉefe pro tio, ke pro malbonaj poŝtaj rilatoj tute ĉesis kontakto inter kelkaj kunlaborantoj. Ŝajnis, ke estos necese rekomenci la laboron kaj la preparkomitato de ESLI jam diskutis pri tio. Sed en oktobro, tute neatendite, venis letero de plej maljuna ano de estinta komisiono, 78-jara svisa samideano O. E. Zimmerman kun ĝojiga informo, ke li dum tutaj 10 jaroj ne forlasis la ideon pri fakterminaro kaj ke li finis ĝin. Li transdonis la terminaron al preparkomitato de ESLI, kiu ĝin nun pridiskutas kaj penas publikigi ĝin en kutima formo de fakterminaroj. La manuskripto enhavas sur 16 paĝoj preskaŭ 300 terminojn kun bonaj klarigoj.

S-ano O. E. Zimmerman estas certe plej taŭga kaj plej sperta por tiu ĉi tasko — li estas konata pro sia multjara poresperanta laboro. Li estas esperantisto jam de 1903 kaj ek de tiu tempo aktive laboras por Esperanto. Li estas ankaŭ sperta ŝakisto. Li konatiĝis kun ŝakludo jam kiel 10-jara knabo kaj restis al ĝi fidela ĝis nun. Li estas bofrato de grandmajstro Ernst Grünfeld, mondkonata ŝaka teoriisto kaj verkisto.

Estas necese diri, ke ni jam nepre bezonas publikigon de tiu terminaro, ĉar inter esp.ŝakistoj regas vere tre diversaj opinioj pri kelkaj terminoj, precipe pri nomoj de kelkaj figuroj. Tial ni decidis konatigi niajn legantojn almenaŭ kun ĉefaj terminoj, uzataj en esp.ŝako. Do, jen la nomoj de figuroj: reĝo (R), damo

(D), turo (T), kuriero (K), ĉevalo (Ĉ). Aliaj pecoj sur ŝaktabulo estas peonoj (por ili ni kutime ne uzas mallongigon). Precipe la terminoj „kuriero“ kaj „ĉevalo“ estas kelkfoje kritikataj, sed ambaŭ estas jam longe uzataj (vidu eĉ Enciklopedion!) kaj troviĝas ankaŭ en terminareto, publikigita antaŭ 10 jaroj per s-ano G. Shepherd.


En Esperanto ni uzas algebran notadon — pro ĝia vere internacia komprenebleco. En tiu ĉi notado la kolonoj — de maldekstra mano de blanko — estas signitaj per literoj a—h, kaj la vicoj per ciferoj 1—8 (ree el vidpunkto de blanko).

La partio finiĝas per mato aŭ per rezigno de unu el ludantoj. Ĝi povas finiĝi ankaŭ per remiso, sen venkinto kaj sen venkito. Partio estas remisa ankaŭ tiam, se la reĝo de unu ludanto estas en pato.

Malgranda aroko (aroketo) estas skribata 0-0, granda aroko (arokego) 0-0-0.

Problemo n-ro 3

J. Aizikowicz, Haifa, Israelo



MATO en kvar movoj.

Kontrolo: Bl.: Rh5, De3, Kb2, Ĉg5, p.: d3; Ni.: Rf5, Tf4, Kb7, p.: c5, d6, f7, g4.

Solvojn sendu ĝis 31-5-'58 al gvidanto de la rubriko.

ESPERANTO DOMO EN AŬSTRIO REALIĜAS!

La farmkontrakto inter bienisto S-ro Franz Hoffmanninger, bienisto, Haslinger in Hasledt, Oberholzam 3, Schwanenstadt kaj samideano L. Kaufmann, reprezentanto de la Verda Ordeno, en Linz, Supra Aŭstrio kreas en Aŭstrio Esperantodomon, la unuan korton de la Verda Ordeno. Tiu ĉi Esperantodomo estas, por la provinco Supro-Aŭstrio tipa, kvarangula bona korto kun 14 hektaroj da grundo. La farmkontrakto kuros 10 jarojn kaj komenciĝas la 1-an de marto 1958. Ĝi estas la unua korto en la vico de la projektataj kortoj de la Verda Ordeno. La korto ne estas tiel bontaŭga, kiel ekzemple la Franca-Esperanto-Kultura-Domo, Kastelo de Grésillon, sed por la komenco sufiĉas.

Ni nepre bezonas profesie agantajn Esperanto-instruistojn. La nova Esper-

anto-domo servu ĉefe solvi la problemon. Dum la jaro 1958 venos el kelkaj landoj samideanoj sin profesie dediĉante realigi la revon de nia Majstro D-ro Zamenhof: „Esperanto fortikiĝas nur en tia okazo, se ekzistas grupo da homoj, kiuj akceptas ĝin kiel lingvo familia hereda“.

En la domo ni kune laborados kaj studados la spiritaĵojn kaj praktikajn bezonajojn de Esperanto instruistoj. Ni mem solvos nian vivtenadon, ni plantos kaj produktos tion, kion kutime plantas kaj produktas bienistoj, kaj dum la kroma tempo ni studados la necesajn fakojn.

La Esperanto domo troviĝas en sufiĉe bela regiono de la provinco Supra-Aŭstrio, rekte antaŭ la enirejo al la tiel nomata perlo de Aŭstrio, la „Salzkammergut“. La domo troviĝas 500 metrojn alte, kaj la elrigardo karesas la ĉenon de la Supro-Aŭstria, kaj Stiriaj alpoj.

L. Kaufmann, Leonfeldnerstr. 53, Linz, Aŭstrio.

En la Kabineto de la Urbodomo



En la urbestra kabineto de Mainz la Loka Kongresa Komitato de la 43-a Universala Kongreso periode kunvenas, sub la prezidado de la Urbestro mem. S-ro Franz Stein. Ni vidas en la bildo unu kunsidon de LKK: funde S-ro Stein legas la tagordon kaj gvidas la diskutadon. Ambaŭflanke sidas (maldekstre) S-ro Harasin, vic-prezidanto, kaj (dekstre) S-ro Fighiera, Konstanta Kongresa Sekretario. Sekvas apud ili, maldekstre: S-ro Böhm, sekretario, S-ro Helffenbein, programoj kaj deĵoroj, S-ro Jolliet, Universala Ekspozicio; dekstre: S-ino Hachtel, loĝado, kaj F-ino Gauck, Ekskursoj. Bedaŭrinde la legantoj ne povas vidi s-ron Herrmann, estrarano de UEA, ankaŭ vic-prezidanto, kaj s-ro L. Weeser-Krell, informado. La urbo Mainz disponigis al KKS belan oficejon, moderne instalitan, en la Urbodomo mem, kaj salajratan esperantistan helpanton. La 43-a estos antaŭvideble la plej granda postmilita kongreso: LKK kaj la Estraro de UEA preparas en ĝi tre ampleksan, varian kaj prestiĝodonan programon, kiu firme ankoraŭ plialtigas la poziciojn de Esperanto en la tuta mondo.

El la redakcio

Malgraŭ tio, ke mi dediĉas proks. 30 „liberajn“ horojn ĉiusemajne al Esperanto, mi trovas, ke nur per la plej intensa fortostreĉo mi sukcesas fari ĉiujn necesajn laborojn por la redaktado de nia revuo. Kaj tamen ĉiam postrestas, ekzemple, la korespondado. Okazas ankaŭ, ke tiu ĉi numero iom malfrue aperas, ĉar mi estis dum unu semajno malsana kaj ne povis akurate pritrakti la manuskriptojn. Mi petas pardonon de la aĝabla legantaro.

Tamen mi mencias tion, ne por plendi, sed por peti la pli efikan kunlaboradon de la kunlaborantoj. Efektive, sufiĉe granda parto de la laboro estas, por tiel diri, „nenecesa“. Nome, se la kontribuantoj skrupule plenumus la normalajn kondiĉojn de manuskript-prezento, tio ŝparus al mi la grandan penon tajpi aŭ retajpi multan materialon. Se oni sendas al la presejo fuŝfaritan manuskripton, la rezultanta fuŝkomposto alportas pli da laboro ne nur al la redakcio sed ankaŭ al la kompatinda kompostisto, kaj, krom tio, la fina presajo ne ĉiam estas perfekta.

Por eviti tion, ni estas devigataj insisti pri la normalaj reguloj de kontribuado. De nun ni principe akceptos nur manuskriptojn, kiuj estas klare tajpitaj kun interspaco kaj en du ekzempleroj. Post-

korektoj sur la manuskripto estu nepre klare legeblaj, kaj oni laŭeble evitu ilin. Krome ni ricevas tro multajn manuskriptojn kun diversaj surogatoj anstataŭ la litero ŭ; oni uzas ekzemple ŭ aŭ ŭ. Ni tre petas la amikojn fari al si la malgrandan penon perplume korekti tion antaŭ la alsendo, ĉar alie ni mem devas fari tion, kaj por tio ni vere ne havas tempon.

Ankoraŭ unu vorto pri la korespondado. Mi scias, ke multaj leteroj ankoraŭ kuŝas neresponditaj, kaj mi tre bedaŭras tion. Kun la tempo ĉio estos respondita, kaj mi petas paciencon de tiuj, kiuj ankoraŭ atendas. Tamen mi ne povas ne atentigi, ke preskaŭ neniu korespondanto sendas respondukuponon (eĉ el landoj, kie ili estas haveblaj), kaj tia korespondanto ne havas la rajton postuli respondon, nek la resendon de siaj manuskriptoj neuzofaj.

Kvankam mi daŭre klopodos kontentigi ĉiujn korespondantojn, tamen eble la supra konstato ne restos seneĥa...

LA REDAKTORO

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

	£	ŝ	p
La stato je la 30-a de novembro 1957	164-	12-	1
S-ro W. Baaten, Nederlando		6-	1
D-ro Fernández-Ménendez, Urugvajo		9-	5
S-ro E. J. Weber, Novzelando		9-	5
S-ro A. Wesser, Usono		1-	10
S-ro P. Williams, Novzelando		10-	0
D-ro R. Zaballos Morales, Urugvajo		9-	5
S-ro B. B. Beaumont, Britujo	1-	0-	0
S-ro E. P. Ockey, Britujo	1-	0-	0
S-ro W. H. Higham, Britujo	1-	0-	0
Woods Hole-Grupo, Usono	3-	10-	0
S-ro C. Winchcombe, Aŭstralio		8-	0
S-ro Einar Hansen, Danlando		2-	10
S-ro Ole Hansen, Danlando	1-	2-	6
La stato je la 31-a de decembro 1957	175-	1-	7

Al ĉiuj donacintoj en la jaro 1957 plej koran dankon.

Donacojn por C.E.D. oni povas sendi al la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtweg 7, Rotterdam, C. Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris, X. Francujo; al ĉefdelegitoj aŭ perantoj de U.E.A. aŭ al C.E.D. rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Antaŭen al 30.000!

Pagu frue vian kotizon!

Magnetofona Servo de U.E.A.

Komisiito: Rüdiger Eichholz
ĉe Esperanto Press
Oakville, Ont., Kanado

Ĝisnuna listo de haveblaj sonbendoj

Mag. W. Auld: „*La nuntempa Esperanto-literaturo*” (Surbendigita en Kastelo Gresillon, somero 1957).

Prof. I. Lapenna: „*La laboroj de UNESKO por interkonigo de popoloj*”. (Surbendigita en Kastelo Gresillon, somero 1957).

Prof. G. Waringhien: „*Pri la Loire-Civilizacio*”. (Surbendigita en Kastelo Gresillon, somero 1957).

Inĝ. R. Watier: „*Modernaj teknikaj revolucioj: atomenergio kaj automatigo*”. (Surbendigita en Kastelo Gresillon, somero 1957).

D-ro A. Albault: „*La problemoj de la malsato en la mondo*”. (Surbendigita en Kastelo Gresillon, somero 1957).

La Esperanta teksto de la lernolibro „*Teach Yourself Esperanto*” de J. Cresswell kaj J. Hartley. Legata de K. Brento, R. kaj V. Eichholz.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Oficiala Servo de U.E.A.

K.S.M. bezonas nepre fidindajn adresojn

El iuj landoj mi ricevas multege da adresoj; el aliaj mi ricevas tre malmultajn aŭ eĉ absolute neniun. Tio dependas de multaj faktoroj: amplekso de la lando kaj de ĝia loĝantaro; pli-malpli grava Esperanto-movado en la koncerna lando; ktp. Aliflanke estas landoj tre „petataj” en la korespondodeziroj; aliaj, tre malmulte; kaj fine aliaj, tute ne! Kaj preskaŭ ĉiam, la landoj plej postulataj estas precize tiuj, el kiuj venis malplej da adresoj! Estas la plej grava problemoj de K.S.M., ofte pli gravigita per la troa postulemo de kelkaj uzantoj!

Tial mi bezonas helpon de bonvolaj samideanoj en iuj landoj, kies adresonombro estas en miaj sliparoj tre nesufiĉa. Mi petos tiujn personojn, ke ili sendu al mi, iam kaj iam, listojn de korespondopretaj esperantistoj el siaj respektivaj landoj, kion ili (surloke) povos pli facile fari ol mi mem, ekzemple interrilatigante kun siaj naciaj asocioj, verkante artikolojn kaj alvokojn en la nacia Esperanto-gazetaro, petante de sialandaj grupestroj kaj kursestroj listojn de korespondopretaj anoj, farante enketojn por malkovri ĉiujn korespondemulojn en siaj landoj. Dank’ al tiu reto de kunlaborantoj

K.S.M. povos vere efike servi al ĉiuj. Personoj interesataj per tiu propono kaj dezirantaj kunlabori kun mi, anoncu sin perletere, sed **nur** el la ĉi sube indikataj landoj (aŭ mondpartoj): Islando, skandinaviaj landoj, Finnlando, Irlando, Belgujo, Nederlando, Svislando, Aŭstrujo, Rumanujo, Portugalujo, Hispanujo, Turkujo; ĉiuj landoj afrikaj, amerikaj, aziaj; Indonezio, Aŭstralio, Nov-Zelando.

Fakte, el ĉiuj landoj supre menciitaj, mi ricevas malpli da adresoj, ol mi bezonas, laŭ la petoj de alilandanoj. Mi antaŭdankas miajn kunlaborantojn, dank’ al kiuj K.S.M. espereble baldaŭ meritos la adjektivon „mondskala”. Sed ne sendu unue listojn. Nur proponu vin kiel

helpontojn: el ĉiu lando mi elektos unu kunlaboranton kaj sendos al li la specialajn foliojn, pri kiuj mi jam ofte skribis, por plenumo kaj resendo.

Al ĉiuj mi konsilas atente relegi la artikolon en la pasintmonata numero de ESPERANTO kaj rekomendas sendi al K.S.M. respondon al la demando kun la ok necesaj informoj pri si mem ĉi-poste resumitaj: a) antaŭ- kaj familia nomo? b) aĝo? c) edzo aŭ fraŭlo? d) adreso? e) profesio? f) filatelisto? g) kun kiuj landoj (almenaŭ 5)? h) kun kiom da korespondantoj?

Ĉion pri K.S.M. sendu al: **Daniel Luez, LAON (Aisne), Francujo.**



Romantika vizaĝo de Mainz



La grava filatela firmao „Baviera“ (via Battisti n. 2, Bologna, Italujo) aranĝis, okaze de la Zamenhof-tago, ekspozicion de esperantaj poŝtmarkoj. Ĝi vekis tiom da intereso en la urbo, ke la estro lasis ĝin ĝis la fino de la jaro. La firmao „Baviera“ korespondas kaj akceptas mendojn de la tuta mondo esperantlingve.

INTERNACIA LERNEJA SPORTKONKURSO

Estas vere dirite ke tre efektiva rimedo por la plibonigo de nia afero estas la uzado de Esperanto por la organizado de ne specife esperantaj okazaĵoj — ekzemple, konferencoj de fakuloj, ne speciale por Esperantistoj, sed en kiuj Esperanto estas la sola oficiala lingvo. Mi estas tutcerta ke estas per tiaj rimedoj ke la praktika valoro de la internacia lingvo plej bone povas montri sin al multaj tiuj ordinaraĵoj, kiuj, kvankam ne tute senidealaj, estas pli forte tuŝataj de praktikaj faktoj ol per vortoj kaj idealoj.

Tia manifestacio de la utileco de Esperanto ekzistas nun por ĉiu esperantista instruisto en la Internacia Lerneja Sportkonkurso, kiu okazas ĉiujare je la internacia tago de infanoj, la unuan de junio. La konkurson organizas per Esperanto S-ro Oldrich Schwetter, Havirav I, blok 14/67, instruisto de gimnastiko en la Mezlernejo de Klement Gottwald ĉe Dolni Bludovice, Ĉeĥoslovakujo.

Je 1956, la unua jaro, aliĝis dek lernejoj (el kvin landoj) kaj je 1957 nur ses (el tri landoj). Sendube tiu ĉi afero gajnas signifon kaj prestiĝon proporcie je la nombro de partoprenantoj. Eĉ nun, dum la unuaj du jaroj, iom da bona kaj efika loka propagando ebligis ĉe la malmultaj lernejoj kiuj aliĝis. Fotograf-aĵoj kaj raportoj ja aperis en lokaj ga-

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la hor sistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	10.17-10.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3°-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	14.00-14.15	Piraçununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraçununga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00-19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30-22.55	Sofia, 39.11m, 30.93m. P.
Lundo	23.20-23.35	Bilbao, 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
	17.30-17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m, 13.94 m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzwelldienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.
	18.10-18.30	Valencia, 233m, P. La Voz de Levante, Valencia, Hispanujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 298 m., P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. (D-ro Baur).
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	17.10-17.30	Stockholm, 30.30 m., 26.50 m., 20.20 m. K. Radio I.B.R.A., Poŝtfako 822, Stockholm I, Svedujo.
Merkredo	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	21.55-22.05	Stockholm, 30.30 m., 26.50 m., 20.20 m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.55-22.05	Wien. 208m, 48.74m, 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	22.50-23.00	Hilversum, 402 m., I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
	08.30-08.40	Paris. 280m., 235m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m. P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo. Sao Paulo, 62.83 m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat.)
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
Sabato	21.45-21.57	Vich 193 m. K. Radio Vich (Barcelona), Hispanujo.
	18.30-19.00	Rio de Janeiro. 375m., 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educação, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.30	Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roquete Pinto PRD. 5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 298m., P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 4-II, Tra la literaturo; 7-II, Giacomo Puccini, okaze de la 100-a naskiĝa datreveno; 11-II, Nia Sinjorino de Lourdes, okaze de la 100-a datreveno de la apero; 14-II, Novajoj el Italujo; 18-II, la mondfama tenoro Beniamino Gigli; 21-II Leterkesto kaj bibliografio; 25-II, Grandfastaj ĝojoj; 28-II, Itala belarta urbo Frosinone. Krome, ĉiun merkredon, Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

Radio Zagreb. 6-II, Akademiano Ivo Rotkvič: Esperantista geografio; 13-II, Distra karnavala programo, originala humorajo; 20-II, Bosnio kaj Hercegovinio en historio kaj nuntempo; 27-II Novajoj el Jugoslavio kaj respondoj al korespondantoj.

zetoj, k.t.p. Kompreneble, tamen, ju pli larĝe subtenata estas la konkurso, des pli efika estas la sekvanta loka propagando je la iniciato de ĉiu partoprenanto.

La aranĝoj kaj reguloj estas malmultaj kaj simplaj. Mallonge, la konkurso estas por 14-jaraj geknaboj (ne necesas ke ili mem lernas Esperanton) kaj enhavas tri

partojn en kiuj konkuras ĉiu individuo: sesdek metra kuro, longsalto, ĵeto de kuglo. Ĉiu lerneja skipo konkuras sur la propra sportejo.

Mi forte petas al ĉiu interesata instruisto skribi nun, sen prokrasto, al S-ro Schwetter (ne forgesante aldoni respondokuponon) por detaloj de la konkurso en 1958. DAVID G. HILL (Britujo)

La Kongresoj en la Gazetaro

Laŭ la finraportoj de la gvidantoj de la respektivaj Kongresaj Gazetaraj Servoj, S-ro O. C. Lange, Kom. de UEA (Kopenhago), kaj S-ro Paul Saretto (Marseille):

— en la dana gazetaro aperis 703 informoj kaj artikoloj pri la 41-a U.K., kun eldonkvanto de 1.640.000 ekzempleroj kaj kun amplekso de 91.509 cm².

— en la franca gazetaro aperis 358 informoj kaj artikoloj pri la 42-a U.K., kun eldonkvanto de 44.350.000 kaj kun amplekso de 32.539 cm².

La eldonkvantoj estas kontrolitaj de oficialaj ĵurnalistaj kaj reklamadaj instancoj de Danlando kaj Francujo. La Kongresaj Gazetaraj Servoj laboras laŭ modernaj konceptoj kaj aplikas la tezojn akceptitajn en la kunveno de Frostavalen en 1956.

G. C. Fightera, K.K.S.

GRAVA ALVOKO

Por veki pli da intereso por Esperanto inter la gelernantoj kaj geinstruistoj de elementaj — mezlernejoj kaj de geinstruistaj seminarioj, la nederlanda esperantista unuiĝo „La Estonto estas nia” intencas organizi vojaĝantan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj.

Por akiri la bezonatan materialon ĝi petas, ke la samideanoj — geinstruistoj

en la tuta mondo sendu al ĝi kelkajn desegnaĵojn de siaj gelernantoj. La formato estu maksimume 32 x 25 cm kaj minimume 16 x 12½ cm. En la dekstra suba angulo de ĉiu desegnaĵo estu indikitaj la nomo, aĝo kaj adreso de la farint(in)o kune kun la adreso de la lernejo. Ĉiu sendaĵo estos iamaniere rekompencata. Oni sendu ĉion al la prezidanto de L.E.E.N., S-ro F. Weeke, IJsseldijk 20, Diepenveen, Nederlando. S-ro F. Weeke nuntempe gvidas esperantan kurson en la geinstruista seminario en Deventer, urbo en la tuja proksimo de Diepenveen. La direktoro de la seminario tre favoras Esperanton kaj jam promesis, ke sialtempe la ekspozicio povos esti aranĝata en la aŭlo de la seminario.

Estimataj gesamideanoj bonvolu helpi nin por ke ankoraŭ antaŭ komenciĝo de nova instruaro la ekspozicio povu esti preta. Anticipe ni tutkore dankas vin.

La estraro de L.E.E.N.

NEKROLOGO

Eckelt. Forpasis en Berlino Studkonsilisto Alfred Eckelt, antaŭ la milito delegito de UEA en Aussig (ĈSR), dum la lastaj jaroj scienca laboranto en Berlina Scienca Akademio (GDR).

Pilling. La 26-an de decembro 1957 mortis Harold Pilling, 69-jara. Li eklernis Esperanton en 1908 kaj estis prezidanto de la grupo en Burnley, Anglujo.

Vasiljeĥ. La 11-an de novembro 1957 mortis Leonid Vasiljeĥ, malnova kaj tre konata esperantisto en danaj kaj kristana rondoj.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝo

Sly. Kenneth kaj Sybil Sly plezure anoncas la alvenon de filino Janet Clare, la 16-an de novembro 1957, fratino por Frances.

Gefianĉiĝo

De Jonge—Marcziniak. Gefianĉiĝis la 24an de decembro 1957 Aaldert de Jonge kaj Irmgard Marcziniak.

Geedziĝo

Lautenbach-Wuchert. Geedziĝis la 30-an de novembro 1957, en Fulda, Fritz Lautenbach kaj Friedgard Wuchert.

Alvoko al la Ĵurnalistoj

Ekde pluraj monatoj, la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio refunkcias, sub la prezido de S-ro Thormodsen, el Norvegujo. Ĝia Bulteno — nun presata sur ok paĝoj — „Internacia Ĵurnalista” aperas regule kaj volas esti utila ligilo inter la ĉiulandaj Ĵurnalistoj kaj la interesuloj. Ĝi estas abonebla laŭ la jenaj kondiĉoj:

por Ĵurnalistoj kaj gazetoj: 400 francaj frankoj;

por interesuloj: 350 francaj frankoj.

La kotizoj kaj la abonpagoj, estas sendeblaj al S-ro Keremidcjev, Bld Hr. Botev 98, Sofia II, Bulgarujo aŭ al S-ro Ribot, rue Vergnes, Marmande, Francujo (Poŝtkonto 30-900 Bordeaux).

GRAJNOJ EN VENTO

Klasoj kaj Esperanto-Junulgrupoj el ĉiuj landoj, nia lernejo nun organizas la 12-an tutmondan interlernejan rondon „GRAJNOJ EN VENTO” por 6- ĝis 16-jaraj gelernantoj!

La pruvo jam estas farita, ke partopreno en multnacia rondo kun propra eldono de gazeto estas bonega solvo por alproksimigi tutmondan junularon. Tuj skribu al ni!

Osmogodiŝnja Skola „Neven Kirac”, Pula, poŝt.fah 24, Jugoslavio.

* * *

La Centra Oficejo de GRAJNOJ EN VENTO, 66, rue des Pins, Bienne-Biel, Svislando/Suisse daŭre akceptas aliĝojn por siaj 12 internaciaj rondoj (rondoj por 4-8, 8-15, 15-20 jaraj gelernantoj). Petu informojn!

KOREKTO

En la decembra numero de la revuo ni erare anoncis en la rubriko „Tra la Mondo”, ke la Komuna Konversacia Klubo, la eldonisto de la KOKO-serio, festos sian 50-jaran jubileon. Ni devas atentigi niajn legantojn, ke la menciita jubileo estis festota de alia klubo, la Kopenhaga Esperantista Klubo.



En bela halo de la palaca Artindustria Muzeo en Brno, Ĉeĥoslovakio okazis de la 13a ĝis la 29a de oktobro 1957 ekspozicio „70 jaroj de Esperanto”. Estis ekspoziciataj ĉ. 300 libroj (la plej gravaj kaj reprezentaj), ĉ. 200 prospektoj, ĉ. 70 gazetoj (ĉiam po 4-6 de la ĵarkolekto), Unesko-aŭŝioj kaj aliaj, kompleta serio de Esp.-poŝtmarkoj, k.c. La uzita materialo estis nur nova kaj freŝdata. La ekspozicion vizitis proks. 3000 homoj, kaj ĝin inaŭguris direktoro de Kulturdomo en Brno F. Špička.

Esperanto kaj stenografio en ĈSR

En stenografiaj rondoj en Ĉeĥoslovakujo Esperanto havas bonajn favorantojn. Nun la afero ankoraŭ pliboniĝis. Mencioj pri Esperanto plurfoje aperis en stenografiaj publikajoj. Slovakingva lernolibro „Stenografia II” enhavas dupaĝan artikolon pri Esperanto, presitan stenografie kaj normallitere. Ĝi servas kiel diktajo por ekzerci ritman stenografian skribadon. Laŭ la lernolibro oni devige instruas en ĉiuj ekonomiaj lernejoj en Slovakujo. Tiamaniere studentoj 16—17 jaraj informiĝas pri nia lingvo. Mi pensas, ke ĉiuj gesamideanoj, kiuj povas kontaktiĝi kun aŭtoroj de stenografiaj lernolibroj, povus instigi ilin, ke ili enviciĝu artikolojn pri Esperanto en la libroj. La stenografiaj lernolibroj estas tiaspecaj, ke ili enhavas artikolojn pri plej diversaj temoj. Tiun econ ne havas aliaj lernejoj lernolibroj — eble nur la lingvaj, sed jen ĝuste la lingvo estas por ni malhelpo.

Kaj ankoraŭ kelkaj vortoj pri la aŭtoro de „Stenografia II”. Li estas S-ro Jozef Mistrik, kiu ĝuste nun fariĝis direktoro de Ŝtata stenografia instituto en Bratislava. Li mem estis antaŭ kelkaj jaroj aktiva samideano, sed nun pro troa okupiĝo pri stenografio (li redaktas stenografiajn revuojn, verkas lernolibrojn k.s.) li ne trovas temon por Esperanto,

sed restas nia amiko, kiel atestas la supre menciita artikolo. Tial mi pensas, ke estus tre konvene, ke gesamideanoj el la tuta mondo gratulu al li pro la nova ofico. Adreso estas: S-ro Jozef Mistrik, prom. ped., direktoro de Ŝtata stenografia instituto, str. Panenská 13, Bratislava, ĈSR.

Ad. Stanura.

Ni Funebros

D-ro Atanas D. Atanasov (Agro), 8-3-1897—20-12-1957. La 20-an de decembro '57 mortis en Sofio post kelkfoja ripeta malsanado D-ro At. D. Atanasov, Honora Membro de UEA, apenaŭ 60-jara. Li aŭdis la unuan fojon pri Esperanto antaŭ proksimume 50 jaroj, kaj kelkajn jarojn poste li ellernis la lingvon. Inter 1920 kaj 1929 li loĝis kaj studis eksterlande, kaj ĉie kie li estis, kiel ankaŭ en Bulgarujo, kun esperantistoj li parolis nur kaj ĉiam en Esperanto. Kiam li finis la studadon li prezentis en Parizo sian tezon por doktora titolo en Esperanto.

Kiel Sciencisto-esperantisto, Atanasov gvidis la laboron por kompilo de agrikultura terminaro ĉe la Terminara Sekcio de ISAE. Bedaŭrinde pro la malsano li ne sukcesis prepari tiun terminaron.

Theodor R. Ĉejka (10-1-1878—25-11-1957). En Bystrice pod Hostynem (Ĉeĥoslovakio) mortis la 26-an de novembro 1957 la konata Esperanto-pioniro Theodor R. Ĉejka. Li estis aŭtoro de unuaj

Esperanto-lernolibroj kaj vortaroj, fondinto kaj redaktoro de *Revuo Internacia kaj Ĉesky esperantista*; krom tio li redaktis la *Internacian Pedagogian Revuon*, kiu estis oficiala organo de la iama Internacia Asocio de Instruistoj. Pro sia merito li fariĝis Honora Membro de UEA, membro de Lingva Komitato kaj diplomita membro de multaj societoj (ankaŭ neesperantistaj). Multe da mono, tempo kaj sano li oferis al nia afero. Lia nobla edzino subtenis lin fidele en lia laboro.

N. B. Havkin. La 18-an de novembro 1957, en aĝo de 83 jaroj, forpasis en Jerusalemo Nathan Ben-cion Havkin, veterano de la esperantista movado. Li estis pioniro de Esperanto en Israel, sed li naskiĝis (en 1874) en Hotimsk, urbeto en Blankrusujo. En 1921 li enmigris en la tiaman Palestinon, kie li verkadis kaj proprakoste eldonis propagandajn broŝurojn. En 1925 li kunvokis la unuan Palestinan tutlandan esperantistan kunvenon en Jerusalemo, kaj en 1941 li kontribuis al la fondiĝo de „Palestina Esperanto-Ligo”, en Hajfo; fine, en 1949 li estis la kunfondinto de Esperanto-Ligo Israellanda, en Tel-Aviv. Li estis eldonisto de la libroj „Hebrea kantareto” (de J. Kohen-Cedek), „Hebrea rakontoj” (de J. Rabinovic), „Eterna Sopiro” (de D-ro Olsvanger) kaj „Tiberio” de J. Kohen-Cedek. Li planis establi en Jerusalemo Esperanto-Instituton, kaj tiucele fondis t.n. „Zamenhof-fondon”.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 301

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de decembro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de decembro 1956:

	1956	1957
Asociaj membroj	16670	19551
Individuaj membroj		
MJ	958	825
MA	4406	5548
MS	740	682
Pat.	9	5
DM	293	315
HM	54	52
JMJ	—	15
JMA	—	100
	6460	7542
	23130	27093

DELEGITOJ

Aŭstralio
Brisbane (Queensland) VD: Vakas.
Aŭstrujo
Wien VD: Mag. Franz Höfert, apotekisto. Penzingerstr. 121.

Britujo

Hexham (Northumberland) FD (rotario):
S-ro John Brownlee, gasdistribuestro,
11 Shaftoe Crescent.
FD (gasindustrio): Vakas.

Danlando

Glostrup (Sjaelland) FD (fervojoj): S-ro E. Henning Olson, fervoja oficisto, Vestergaardsvej 89, 2 M.
Silkeborg (Jylland) FD (poŝto): S-ro Arne Kolle, poŝtoficisto, Landlystvej 48.

Finnlando

Kemi (Lapin lääni) D: Vakas.

Francujo

Bellerive sur Allier D: S-ro Léon Courtinat, emerita poŝtdirektoro, 20 rue Charloing.
Croix (Nord) FD (jurnalismo): S-ro Lucien Giloteaux, journalisto, 19 rue Colmar.
JD: Vakas.
Fécamp (Seine Maritime) VD: S-ro Ernest Permann, kontisto, 9 rue St. Etienne.
Sartrouville (Seine et Oise) FD (religio: katolikismo): S-ro Joseph Pion, oficisto, 95 B. Henri Bartrisse, Val Notre Dame.
St. Pourcain sur Sioule (Allier) D: Vakas.

Germanujo

Altensteig Württ.-Hornberg D: Vakas.
Dobrock-Wingst (Niedersachsen) D: S-ro Heinrich Gätjens, emerita instruisto, 393, Post Höftgrube.

Gronau i.W. FD (filatelo, nur kristmotiva laŭ „St. Gabriel“): S-ro Georg Podlinski, ekslernejestro, Eschweg 10.

Höxter (Nordrh.-Westfalen) FD (ortopedio), S-ro Heinrich Wieners, ortopedia-mehanikisto, Rosenstrasse 9.

Kassel (Hessen) D: S-ro Erich Richter, teknikisto, Im Lohre 151.

Montabaur (Rheinland-Pfalz) D: S-ro Karl Ernst Salzmänn, studento, Herrnhahn-Weg.

Nordhorn (Niedersachsen) D: S-ino Käthe Rosenstengel, muzikinstruistino, Bahnhofstrasse 17.

Nürnberg (Bayern) FD (komerco): S-ro Otto Pilhofer, komercisto, Mögeldorf Hauptstrasse 2.

Solingen (Nordrhein-Westfalen) FD (komerco): Vakas.

Wilhelmshaven (Niedersachsen) D: S-ro Wilhelm Wiegel, instruisto, Wilhelmshaven-9, Salzstr. 4.

Wuppertal (Nordrhein-Westfalen) FD (sociala por malsanula asekuro): S-ro Anton Kronshage, administra inspektoro, Hatzfelder Str. 116a.

Hispanujo

Badalona (Barcelona) FD (fervoĵaj aferoj): Vakas.

Hungarujo

Győr FD (lingvoinstruado): S-ro Andor Gaüder, lingvoprofesoro, Rónay Jácint-strato 2/b.

Italujo

Bari (Puglia) D: S-ro Adamo Lacalendola, jama universitata profesoro, Via Dante 323.

Egna (Bolzano) FD (mondpaco kaj mondreligio): S-ro Ludovico Unterhauser, radioteknikisto.

Firenze FD (modo por virinoj): S-ino Disma Cappelli, Via Nino Bixio 12.

Sciaccia (Agrigento) D: S-ro Franco Tulone, instruisto, Via Perollo 84.

Japanujo

Tokio FD (elektrotekniko): S-ro Sizuo Nakamura, elektra inĝeniero, Iwato 1088, Komae-nati (Kitatama).

Jugoslavio

Ljubljana (Slovenija) FD (metiistaj aferoj): S-ro Tone Logar, grafikisto, Trubarjeva c. 31.

Mostar (Hercegovina) FD (geografio): S-ro Branimir-Brana Stanjevic, profesoro, Viša Pedagoška, Skola.

Kanado

Montreal (Quebec) VD: S-ro Leif Heilberg, reprezentanto, 2238 Souvenir Street.

Maroko

Meknes VD: S-ro Jules Vidal (poŝtinspektoro), 5 rue de Gascogne.

Nederlando

Delft (Zuid-Holland) FD (plastikaj artoj): S-ro Jan Schaap Jr., artinstruisto, Verwersdijk 95.

Ede (Gelderland) VD: S-ino Lucie Weijer, mastrumistino, C. van Ommerenweg 12.

Norvegujo

Drammen (Buskerud) D: S-ro Per Engen, fervojisto, Nordahl Brunsgt. 10.

Hønefoss (Buskerud) D: Vakas.

Oslo VD: Vakas.

FD (artflikado): S-ino Pepita de Caspary, artŝtopistino, Drammensveien 102 K.

Pollando

Warszawa FD (elektrotekniko): S-ino Felicja Szyszko-Witulska, inĝenierino, ul. Glogera 4, m.20.

Sovetunio

Tartu (Tartu-Estonio) D: S-ro Peeter Anso, instruisto, Kastani 24-1.

Svedujo

Arvidsjaur (Lappland) FD (hotelo): S-ro Frederik Neumeister, barman, Hotel-Laponia.

Göteborg FD (budhismo): S-ro Arthur Herman Tähtinen, hejtisto, Sjömansgatan 13.

Hudiksvall (Hälsingland) D: S-ro Curt Bohman, instruisto, Bergsjö.

Svislando

Sangenthal (Bern) JD: S-ro David Buhlmann, keramisto, Feldstrasse 28a.

Usono

Jersey City (New Jersey) D: S-ro John Clarke, inĝeniero telefona, 25 Van Reipen Avenue.

Power (W.Va) D: Vakas.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1957

657 Forté, S-ro Antoine, Jerada, Maroko

658 Hug, S-ro Raymond, Casablanca, Maroko.

659 Assarsson, S-ino Asta, Hälsingborg, Svedujo.

660 Johansson, S-ro Bernt, Hälsingborg, Svedujo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Abegg, S-ro M., Zürich, Svislando.

Calógero, S-ro Rodolfo G., Buenos Aires, Argentino.

Ćerri, F-ino Mariagrazia, Biella, Italujo.

Feis, S-ro Gunter, Altenwald, Sarlando.

Hunkeler, S-ro H., Aarau, Svislando.

Jørgensen, S-ro Gunnar, Skovstrade, Danlando.

Lamby, S-ro Klemens, Mulheim, Germanujo.

Maasbommel, F-ino E. M., Rotterdam, Nederlando.

Milkschutz, S-ro Curt Julio, Olivos, Argentino.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1958

67 Ehrlich, S-ro B., Sydney, Aŭstralio.

68 Harry, S-ro Ralph, Melbourne, Aŭstralio.

69 Linton, S-ro K. G., Melbourne, Aŭstralio.

70 Maddern, S-ro Ivan T., Moe, Aŭstralio.

71 Parry, S-ro S. L., Brisbane, Aŭstralio.

72 Winchcombe, S-ro C., Welland, Aŭstralio.

73 Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo.

74 Boatman, S-ro Douglas P., Westcliff-on-Sea, Britujo.

75 Crabtree, S-ro E. P., Kirkheaton, Britujo.

76 Dickinson, S-ro G. L., Liverpool, Britujo.

77 Fraser, S-ro T. C., Kirkcaldy, Britujo.

78 Gardner, S-ro C. W., Sheffield, Britujo.

79 Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Britujo.

80 Higham, S-ro W. H., Liverpool, Britujo.

81 Langham, S-ro W., Iver, Britujo.

82 Leather, S-ro A. J., Blackburn, Britujo.

83 Miller, S-ro J. R., Stone, Britujo.

84 Moberly, S-ro E. W., London, Britujo.

85 Pearson, S-ro Maurice, Sheffield, Britujo.

86 Prince, S-ro A., Letchworth, Britujo.

87 Sarfas, S-ro E. W., New Barnet, Britujo.

88 Shield, S-ro W. J., Cheshire, Britujo

89 Westmancote, S-ro W. F., Bristol, Britujo.

90 Hansen, S-ro E., København, Danlando.

91 Jahn, S-ro C. J., Brønshøj, Danlando.

92 Jensen, S-ro Gorm Eskjaer, Faxe, Danlando.

93 Jensen, S-ro H. E., Toustrup, Danlando.

94 Lange, S-ro O. C., København-Valby, Danlando.

95 Larsen, S-ro L., Odense, Danlando.

96 Møller, S-ino Ellen, Fåborg, Danlando.

97 Petersen, F-ino Anna, København, Danlando.

98 Trier, S-ro Bent Sejr, Haslev, Danlando.

99 Vaarst, S-ro Emil, Aalborg, Danlando.

100 Arrieu, S-ro F., Toulouse, Francujo.

101 Beau, S-ro Jean, Marseille, Francujo

102 Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo.

103 Borel, S-ro Emile, Arles-sur-Rhône, Francujo.

104 Broise, S-ro Auguste, Longué, Francujo.

105 Charlet, F-ino J., S. Bel, Francujo.

106 Maillard, D-ro G., Bourg-la-Rheine, Francujo.

107 Marchand, F-ino Marthe, Paris, Francujo.

108 Verot, S-ro F., St. Etienne, Francujo.

109 Bitterling, D-ro H., Pullach, Germanujo.

110 Carstensen, S-ro Th., Ahrensbock, Germanujo.

111 Frick, F-ino Käthe, Wiesbaden, Germanujo.

112 Fritzsching, Wiesbaden, Germanujo

113 Gerwin, S-ro R., Lobberich, Germanujo.

114 Grundhoff, S-ro Josef, Wuppertal, Germanujo.

- 115 Janssen, S-ro Fritz, Oldenburg, Germanujo.
 116 Kind, S-ro Ernst, Bonn, Germanujo.
 117 Krause, S-ro Walter, Berlin, Germanujo.
 118 Kreuzer, D-ro Job, Frankfurt a/M., Germanujo.
 119 Michling, Ing. Horst, Göttingen, Germanujo.
 120 Orterer, F-ino Anna Maria, Kreuth, Germanujo.
 121 Rosenhäger, S-ro Hans, Dortmund-Wambel, Germanujo.
 122 Sandrock, S-ro Otto, Essen, Germanujo.
 123 Starke, S-ro Alexander, Erlangen, Germanujo.
 124 Vosteen, S-ro Karl, Hude, Germanujo.
 125 Wehrheim, D-ro H., Hildesheim, Germanujo.
 126 Wetterstein, S-ro August, Welper, Germanujo.
 127 Giunio, S-ro Petro, Zagreb, Jugoslavio.
 128 Majcenovic, S-ro Mijo, Zabno, Jugoslavio.
 129 Petrovic, Prof. Svetislav S., Pirot, Jugoslavio.
 130 Forgeau, S-ro Jean, Montreal, Kanado.
 131 Tuch, S-ino R., Toronto, Kanado.
 132 Juarez-Sedeno, S-ro Raul, Camaguey, Kubo.
 133 Amaral, Ing. Hugo, Funchal, Madejro.
 134 Hug, S-ro Raymond, Casablanca, Maroko.
 135 Bijmolt-Ochtman, S-ino C., Amsterdam, Nederlando.
 136 Boelsma, S-ro P. A., Haarlem, Nederlando.
 137 Laverman, F-ino A. A., Leeuwarden, Nederlando.
 138 Ravestein-Baster, S-ino J. M., Den Haag, Nederlando.
 139 Birch-Olsen, S-ino S., Greaker, Norvegujo.
 140 Engen, S-r Per, Drammen, Norvegujo.
 141 Falch, S-ro Aage, Kragerø, Norvegujo.
 142 Flodmo, S-ro Johs., MO i Rana, Norvegujo.
 143 Fygle, S-ro Bjørn, Bodø, Norvegujo.
 144 Jensson, S-ro Arnfinn, Oslo, Norvegujo.
 145 Kjøningsen, S-ro Ragnar, Sarpsborg, Norvegujo.
 146 Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo.
 147 Pedersen, S-ino Aagot, Mo i Rana, Norvegujo.
 148 Resberg, S-ro Thure, Sarpsborg, Norvegujo.
 149 Ringstad, S-ro G., Torp, Norvegujo.
 150 Rosbach, S-ro Johan H., Sarpsborg, Norvegujo.
 151 Mills, S-ro W., Waimata, Novzelando.
 152 Antunes, S-ro J., Lisboa, Portugalujo.
 153 Oliveira, S-ro Bernardino António S.C. dos Santos de, Lisboa, Portugalujo.
 154 Sales, S-ro Alfredo L., Leiria, Portugalujo.
 155 Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo.
 156 Woodruff, S-ro E. W., Johannesburg, Sudafriko.
 157 Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo.
 158 Andersson, S-ro Lars, Hoje, Svedujo.
 159 Blid, S-ro A., Nynäshamn, Svedujo.
 160 Edler, S-ro Per, Halmstad, Svedujo.
 161 Emson, S-ino Regina, Borås, Svedujo.
 162 Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo.
 163 Frode, S-ro O., Göteborg, Svedujo.
 164 Jensie, S-ino Märta, Jönköping, Svedujo.
 165 Julin, S-ro Teodor, Stockholm, Svedujo.
 166 Larsson, F-ino Essy, Boden, Svedujo.
 167 Mellberg, F-ino G., Varberg, Svedujo.
 168 Möberg, S-ro Karl J., Bromma, Svedujo.
 169 Olsson, S-ro Olle, Lund, Svedujo.
 170 Pettersson, S-ro Folke, Huvudsta, Svedujo.
 171 Stenström, S-ro John, Jönköping, Svedujo.
 172 Westmann, S-ro Adolf, Leding Björna, Svedujo.
 173 Greutert, S-ro Kurt, Bellinzona, Svislando.
 174 Hattemer, S-ro H., Solothurn, Svislando.
 175 Langmeier, S-ro Samuel, Dübendorf, Svislando.
 176 Sennhauser, Schwester, Bern, Svislando.
 177 Barta, S-ro R., Denver, Usono.
 178 Belinfante, D-ro F. J., West Lafayette, Usono.
 179 Blackstone, S-ro R., Orlovista, Usono.
 180 Carlson, S-ro F., Seattle, Usono.
 181 Dillinger, S-ro H. E., Placerville, Usono.
 182 Futran, S-ro J., New York, Usono.
 183 Mohácsy, D-ro Joseph, New York, Usono.
 184 Nace, S-ro Paul E., Hyattsville, Usono.
 185 Regal, S-ro Arthur E., Downers Grove, Usono.
 186 Smart, S-ro Herbert W., Jackson Heights, Usono.
 187 Van Sloun, F-ino May D., San Francisco, Usono.
 188 Vidack, S-ro J., Seattle, Usono.
 189 Wanzer, S-ro W. O., Long Beach, Usono.
 190 García, S-ro Félix Blázquez, Caracas, Venezuelo.
- PATRONO 1958**
 2 Zollinger, S-ro R., La Chaux-de-Fonds, Svislando.
- NOVA KOMITATANO**
 Albers, S-ro B. J. J., Olympiaweg 69-III, Amsterdam-Z., Nederlando. S-ro Albers estas elektita por anstataŭi S-ron C. B. Zondervan, kiu rezignis pri la komitataneco.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO:

J. E. Falk 95,— gld.; K. Vosteen 2,26 gld.; C. Winchcombe 4,26 gld.

FONDAJO-ZAMENHOF

P. M. Mabesoone, Nederlando 50,— gld.; F-ino C. Zorgdrager, Nederlando 10,— gld.; F. Epstein, Germanujo 50,— gld. Entute: 622,75 gld.

Koran dankon al ĉiuj donacintoj. Larĝe kontribuu por tiu granda celo!

GAJNINTO KONKURSO M.S.

Kiel publikigite, en Marseille la Komitato decidis, lotumi en 1958 inter ĉiuj 100 Membroj-Subtenantoj unu libro-premion en valoro de 10.— n.gld. Tuj post atingo de la unua centoj okazis ceremonieto en la Centra Oficejo. Antaŭ du atestantoj estis tirita la loto no. 53. Kontrolante la liston de MS sur p. 16 de nia januara numero, ni trovis malantaŭ tiu numero la nomon de S-ro H. J. Blokpoel en Rotterdam. Li estas la gajninto! S-ro Blokpoel estas fervora kaj aktiva membro de UEA, regula vizitanto de niaj kongresoj. Estas li, kiu en Marseille per sia senbrua, sed ekzempla gesto inspiris multajn monujojn malfermi sin por kontribui al C.E.D.

Ni kore gratulas al S-ro Blokpoel. La dua lotumo baldaŭ okazos. Kiu sekvos? Altigu vian kategorion al MS kaj partoprenu la konkurson!

NOVJARAJ SALUTOJ

Nia oficejo ricevis grandan amason da plej simpatiaj kaj varmaj bondeziroj de geamikoj el ĉiuj anguloj de la mondo, okaze de la decembraj festotagoj kaj la Nova Jaro. Ne estas eble respondi al ĉiuj aparte, do per tio ĉi ni plej kore reciproke bondeziras al ĉiuj niaj fidelaj kaj sindonaj membroj kaj kunlaborantoj. Ke en 1958 plenumiĝu ĉiuj viaj ardaĵdeziroj!

M. H. VERMAAS,
 Direktorino C.O.

DANKO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO

Okaze de la Nova Jaro mi ricevis tiom da bondeziroj por mi persone kaj por la progreso de U.E.A., ke bedaŭrinde estos al mi neeble respondi al ĉiunuope. Mi dankas al ĉiuj kaj tutkore reciprokas. Tute specialan dankon al la tre multnombraj gratulintoj el Usono kaj Britujo, el kiuj la plejparto eĉ ne indikis sian adreson.

La 1958 alportu al la Esperanto-Movado pliajn progresojn kaj al la mondo pacon, trankvilon kaj feliĉon!

Prof. IVO LAPENNA

ANONCETOJ

Koresponda Servo Mondskala, Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respond kuponon por ĉiu petata korespondanto.

Mikrokanelo disko por perfekta esperanta prononcado, nerompebla po 335 frankoj, speciala albumo por esperantaj poŝtmarkoj po 900 frankoj. Ribot, Esperanto, Marmande, Francujo.

Por restarigo de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

Sendu poŝtmarkojn de via lando, ni reŝanĝos kun egalkvanto de italaj. Alberto Pirola Grassi, Via Quattro, Stagioni 10, Verona, Italujo.

„La Vivo kaj Koncepto de la Societo de Amikoj“. Sendu kvar respond kuponojn al la Sek K.E.S., Jessie Saunders, Sydney Lodge, Bath Road, Ventnor, I.W., Anglujo.

La plej granda vesperjurnalo de Svedujo „Aftonbladet“ publikigas senpage korespondpetojn de eksterlandanoj. Indiku aĝon, sekson, dezirantan korespondtemon! Adreso: Ett ögonblick redaktörn, Aftonbladet, Vattugatan 12, Stockholm 1, Svedujo.

Dezirata intersanĝi poŝtmarkojn kun ĉiuj landoj. Dieter Kremp, Kastellstrasse 17, (17a) Karlsruhe-Durlach, Germanujo. **Esperantistaj polaj geedzoj** deziras korespondadi kun tuta mondo pri fotografado. Wolczyk Czeslaw fotografisto; pri lernado en popollernejo Jadwiga Wolczyk, instruistino, Sosnowiec, ul. Zawila 13a, Pollando. Respondo garantiita.

Ĉiulandan P.M.-intersanĝadon deziras Avri Salamon, Kiryat-Motzkim, P.O.B. 8, Izraelo.

Kiu sendos al mi 100 div. p.m. uzitajn kaj neuzitajn ricevos egalkvanton da nederlandaj. C. Hooykaas, C.249, Slie-drecht, Nederlando.

18 jara junulo deziras korespondi pri astronautiko kaj fotografado kaj intersanĝi fotografajojn. Adreso: Jan Terenda, Katowice, ul. Kosciuszki 33/8 (Pollando).

Letervespero okaze de kursfino meze de marto 1958. Gekursanoj diversaĝaj serĉas korespondantojn el tutmondo. Kvist Gl. Landevaj 146, Herning, Danlando. **Dezirata korespondi** pri interlingvoj, lingvoj, muziko, diskoj, historio. Harold

Mason, 225 University Crescent, London, Ontario, Kanado.

30 geknaboj 10-12 jaraj deziras korespondi kun samaĝaj geknaboj. Adreso: H. Appel, Z.O. Singel 5, Bergen op Zoom, Nederlando.

Korespondi kun tuta mondo pri simplaj temoj deziras: S-ro Alfons de Fauw, Strookotwijk 126, Ruiselede-Doomkerke (W.Vl.), Belgujo.

Korespondi kaj intersanĝi p.m. deziras H. Khel, Pivonková 2124, Praha 10, Ĉeĥoslovakio.

30 ges-anoj deziras korespondi tutmonde letere eĉ bildkarte. Skribu al okazanta letervespero la 1-an de marto 1958-a. Esperanto - MEZ Náchod, CSR.

Sinjoro 34-jara, afliktita, serĉas moralan helpon apud agrablaj amikoj, laŭeble kleraj, artemaj, precipe en aziaj afrikaj sudamerikaj landoj. Nepre respondos al ĉiu korespondantino. Plejajn antaŭdankojn, Marsol, 38 rue Beffroi Narbonne (Aude), Francujo.

Amikoj de la naturo, mi serĉas gekorespondantojn pri montgrimpado, turismo kaj diversaj kulturaj temoj. Skribu al Jiri Rozkydálék, Obecniny 3903, Gottwaldov, Zlín, Ĉeĥoslovakio. Certa respondo.

Sperta esperantisto serĉas geamikojn en la tuta mondo por intersanĝo de tradukitaj naciaj fabeloj kaj rakontoj. Oni intencas fondi korespondan rondon. S-ro L. Ryznar, Čtyricet Lánů, Svitavy, Ĉeĥoslovakio.

Vojaĝantan Ekspozicion preparas la Alĝeria Esperantista Federacio. Helpu la movadon en tiu lando. Sendu ĉiuspecan materialon al: Esperanto, BP 88, Nemours (Tlemcen), Alĝerio.

Letervesperon aranĝos la 28-an de marto 1958 la elementa kurso en Nemours. Ni nepre respondos al ĉiuj. Skribu al Esperanto, BP 88, Nemours (Tlemcen), Alĝerio.

Ekspo 58 Bruselo. Turisma Servo por Belgujo, petu turismajn informojn kaj prospektojn pri Belgujo kaj pri la belega belga Marbordo, kontraŭ resp. kup. aŭ poŝtm. Donas informojn pri la Internacia Ekspozicion 1958 en Bruselo. Rezervas pensionon kaj hotelĉambrojn je moderaj prezoj — donas malmultekostan loĝadon en Esperanto-domo — faras ekskursojn ĉiujn tagojn tra Belgujo kaj ĝis Parizo per aŭtomobilo kaj aŭtobuso. Tousseyn Camille, del. de U.E.A., Statiestraat 35, Jabbeke, Belgujo.

Certe ricevos dankrespondon kiu sendos poŝtkarton kun jenaj kvin vortoj apud respektiva presajafranko: En lingvo esperanta (ĉi-loke via lingvo en Esperanto) Verda Stelo (ĉi du lastaj vortoj nepre nacilingve). Ekzemple: En lingvo hispana Estrella Verde. Skribu al V. Hernández Llusera, Str. Avda. Ej. España 59, SABADELL, Hispanio.

Hispanujo. José Ivern, Plaza San Justo y Pastor 2, BARCELONA, intersanĝos ilustritajn poŝtkartojn.

Antonio Miquel, Baños Viejoa 15, Barcelona, Hispanujo, intersanĝos ilustritajn poŝtkartojn.

Hispana junulo korespondos tutmonde. Jorge Ferrer, Str. Tosca, 15, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

Legu la artikoleon pri „Esperanto-Domo“ sur paĝo 29 kaj tuj prenu kontakton kun S-ro L. Kauffmann, Linz, Aŭstrio, Leonfeldnerstr. 53.

Pro daŭra malsanado kaj hospitala kuracado nia bulgara samideano Krestanoff, Sofio, petas siajn gekorespondantojn ankoraŭ iom pacienci ĝis li estos en stato por kontentigi ilin.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 s 6 p por ĉiu nokto. Prezoj malaltigas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, „Flat Four“, 1, Warrington Crescent, LONDON W.9, Britujo, Telefono CUNningham 4487.

Ĉu ni jam havas vian adreson

por tuj post apero sendi al vi la 72-paĝan kajeron „BELARTO“? Se ne, bonvolu tuj pleniĝi kaj alsendi la mendilon troviĝantan en tiu ĉi numero de la Revuo.

La enhavo jam estas preskaŭ finkompostita. Ĉiu febre kunlaboras, por ke ni povu liveri eldonajon kiel eble plej altkvalitan el ĉiuj vidpunktoj je kiel eble plej malalta prezo.

Rapidu, ĉar la eldonkvanto estas limigita!

Dir. C.O.

Nepagintoj, bonvolu tuj pagi vian kotizon 1958!

Atentu la ĉijaran tarifon!

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de Prof. G. Waringhien kun
kunlaborado de la plej famaj verkistoj. Aperas ĉiun
duan monaton 32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:

En Francujo: R Fiquet, Poŝta konto 2259-98 Marseille

Alilande:

Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:
7, Av. Léon-Gourdault
Chotay-le Roi (Seine)

Administracio:
5. Bd. Stallograd
Nice (A-M)

Francujo

BELARTO

speciala aldono al la revuo ESPERANTO

aperos en la fino de marto 1958 kun multaj kontribuajoj
de verkistoj konataj kaj konotaj!

LITERATURO

PENTRARTO

MUZIKO

LINGVISTIKO

72 p.

Prezo: 2,75 gld (11 steloj) por membroj
3,25 gld (13 steloj) por nemembroj

Antaŭmendu jam nun ĉe U.E.A.!

Aperinta!

ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj:

AULD kaj ROSSETTI

kun multaj kunlaborintoj
320 p., bindita

Prezo: 10 ned. gld. (40 steloj)

Mendu tuj de U.E.A.!

Binditaj Jarkolektoj Esperanto 1957

Ni disponas pri tre limigita kvanto de
kompletaj binditaj jarkolektoj 1957

★

Prezo: por membroj 4,— gld
por nemembroj 8,— gld

Mendu tuj ĉe U.E.A.!

Post longa preparado aperos en la Dua Parto de Jarlibro 1958

Gastronomia Terminaro

verkita de kompetenta specialisto **Erhard Urban**, Ĉeĥoslovakio en lingvoj
Esperanta, Angla, Ĉeĥa, Franca

Tiu aldono grave altiĝos la kostojn de la Jarlibro

TIAL: ĉiuj membroj kaj delegitoj bonvolu

Grandskale varbi reklamojn de restoracioj kaj hoteloj

ĝuste por tiu eldono de la Jarlibro.

Tarifoj kiel indikitaj sur p. 9-10 de Jarlibro II 1957.

Post apero de la koncerna Jarlibro la Terminaro estos vendata ankaŭ aparte

Ĉiuj helpu por sukcesigi ĝin!

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam